Andrzej Pettyn

# PRAKTIKA KURSO DE ESPERANTO
/skrypt do nauki języka esperanto/

SEMESTR I

POLSKI ZWIĄZEK ESPERANTYSTÓW
Warszawa, 1980

ZESZYT 2

## 1. MI INTENCAS AĈETI SKOTERON.

a/ - Mi intencas aĉeti skoteron.
- Mi intencas aĉeti biciklon.
- Mi intencas aĉeti aŭtomobilon.
- Mi intencas aĉeti motorciklon.
- Mi intencas aĉeti libron.
- Kion vi intencas aĉeti?

b/ Barbara: Mi intencas aĉeti libron.
Eŭgeno: Kion?
Barbara: Libron.
Eŭgeno: Por via filo, ĉu?
Barbara: Jes, ĝuste.

c/ Beata: Ĉu vi intencas aĉeti skoteron?
Nina: Jes, mi intencas.
Beata: Por via filino, ĉu ne?
Nina: Jes, ĝuste por ŝi.

ĉ/ Tomaso: Ĉu vi intencas aĉeti biciklon?
Stefano: Jes, mi intencas.
Tomaso: Por kiu?
Stefano: Por mi.

d/ Karlo: Ĉu vi intencas aĉeti aŭtomobilon?
Andreo: Ne, mi ne intencas aĉeti aŭtomobilon.
Karlo: Kion vi deziras aĉeti.
Andreo: Mi deziras aĉeti skoteron aŭ motorciklon.

e/ Maria: Mia edzo intencas aĉeti aŭtomobilon aŭ skoteron.
Greta: Morgaŭ, ĉu ne?
Maria: Jes.

### O b j a ś n i e n i a

..., ĉu? ..., ĉu ne? ..., nieprawdaż? ..., prawda?

Por via, filo, ĉu? Dla twojego syna, nieprawdaż?
Jes, ĝuste. Tak, właśnie.
Por mi. Dla mnie.
aŭ albo, lub

W z ó r 1:

Por via frato, ĉu /ne/?

P r z y k ł a d y:

Por via frato, ĉu ne?
Dla twojego brata, nieprawdaż?
Por via filo, ĉu ne?
Dla twojego syna, nieprawdaż?
Por sinjoro Tadeo, ĉu?
Dla pana Tadeusza, prawda?
Por sinjorino Eva, ĉu?
Dla pani Ewy, prawda?

2. KIEL VI FARTAS?

a/ Irena: Kiel vi fartas?
Danuta: Dankon, bone.
Irena: Kaj kiel fartas viaj gepatroj?
Danuta: Dankon, ili ankaŭ fartas bone.

b/ - Kiel fartas viaj gepatroj?
- Kiel fartas viaj gefratoj?
- Kiel fartas viaj gekolegoj?
- Kiel fartas viaj geonkloj?
- Kiel fartas viaj geavoj?
- Dankon, ili fartas tute bone.

c/ - Kie laboras gesinjoroj Komar?
- Kie laboras viaj gepatroj?
- Kie laboras viaj gefratoj?
- Ili laboras en la fabriko "Wedel".
- Ili laboras en la fabriko "FSO".

O b j a ś n i e n i a

Kiel vi fartas? Jak się masz? Jak się pan/i/ miewa?
viaj gepatroj twoi rodzice /patrz gram. "przed-

rostek ga-*/
tute bone zupełnie dobrze, całkiem dobrze

W z ó r 2:

Kiel fartas viaj gepatroj?

P r z y k ł a d y:

Kiel fartas viaj gepatroj?
Jak się miewają twoi rodzice?
Kiel fartas viaj gefratoj?
Jak się miewa twoje rodzeństwo?
Kiel fartas viaj geonkloj?
Jak się miewa twoje wujostwo?
Kiel fartas viaj gekolegoj?
Jak się miewają twoi koledzy i koleżanki?

3. ĈU VI LERNAS AŬ LABORAS?

a/ - Ĉu vi lernas aŭ laboras?
- Mi lernas.
- Kie vi lernas?
- Mi lernas en la mezlernejo "Hanka Sawicka".

b/ - Ĉu vi lernas aŭ laboras?
- Mi laboras.
- Kie vi laboras?
- En teatro.
- Vi laboras en teatro?
- Jes, en teatro. Mi estas aktoro.

c/ Helena: Ĉu vi studas aŭ laboras?
Renata: Mi laboras.
Helena: Kie vi laboras?
Renata: En fabriko.
Helena: En fabriko?
Renata: Jes, en fabriko. Mi estas laboristino.

d/ Jozefo: Ĉu vi estas instruisto aŭ oficisto?
Marko: Mi estas instruisto.
Jozefo: Instruisto?
Marko: Jes, instruisto. Mi laboras en teknikumo.

Objaśnienia

Ĉu vi lernas aŭ laboras? Uczysz się, czy pracujesz? /patrz gram. "zdania alternatywne"/
aŭ lub, albo /tu: czy/

W z ó r 3:

Ĉu vi estas instruisto aŭ oficisto?

P r z y k ł a d y:

Ĉu vi estas instruisto aŭ oficisto?
Jesteś nauczycielem, czy urzędnikiem?
Ĉu vi estas aktoro aŭ profesoro?
Jesteś aktorem, czy profesorem?
Ĉu vi estas lernanto aŭ studento?
Jesteś uczniem, czy studentem?

4. MI VOLUS FORVETURI AL KRAKOVO?

En la ĉambro estas la patro, la patrino kaj Roberto.

Roberto: Paĉjo, mi volus forveturi al Krakovo?
La patro: Al Krakovo? Kiucele?
Roberto: Por intervidiĝi kun onklo Stefano kaj onklino Dorota.
La patrino: Kun kiu vi volus forveturi al la geonkloj?
Roberto: Kun mia fratino Barbara.
La patrino: Kun Barbara? Aha...
La patro: Kun Barbara? Bone. Kiam vi volus forveturi? Morgaŭ tagmeze aŭ morgaŭ vespere?
Roberto: Morgaŭ tagmeze.
La patro: Bone.
Roberto: Panjo, sed mi volus aĉeti donacon.
La patrino: Donacon?
Roberto: Jes, donacon!
La patrino: Por la geonkloj, ĉu?
Roberto: Jes, por la geonkloj.
La patro: Kion vi volus aĉeti por ili?
Roberto: Mi volus aĉeti por ili fotoalbumon pri Varsovio.

O b j a ś n i e n i a

<u>Paĉjo, ...</u> Tatusiu, ...
<u>Por intervidiĝi kun...</u> Aby zobaczyć się z...
<u>Panjo, ...</u> mamusiu, ...

5. EN KRAKOVO.

Roberto kaj Barbara estas nun en Krakovo. Ili estas en la loĝejo de la geonkloj.

<u>La onklo</u>: Kiel fartas viaj gepatroj?
<u>Roberto</u>: Dankon, bone!
<u>La onklino</u>: Kaj kiel fartas via frato, Karlo?
<u>Barbara</u>: Dankon, li ankaŭ fartas bone.
<u>La onklo</u>: Ĉu li ankoraŭ studas aŭ jam laboras?
<u>Roberto</u>: Li ankoraŭ studas.
<u>La onklino</u>: Ĉu li estas bona kaj diligenta studento?
<u>Barbara</u>: Jes, li estas tre bona kaj diligenta studento.
<u>La onklo</u>: Ĉu viaj gepatroj ankoraŭ laboras en la fabriko "Kasprzak"?
<u>Barbara</u>: Ne. La patro laboras kiel oficisto en la fabriko "FSO", kaj la patrino laboras kiel oficistino en la komerca centralo "Ars Polona".

O b j a ś n i e n i a

<u>Ĉu li ankoraŭ studas aŭ jam laboras?</u> On jeszcze studiuje, czy już pracuje?
<u>la fabriko "Kasprzak"</u> fabryka im. "Kasprzaka" /produkuje radioodbiorniki, telewizory, magnetofony/
<u>la fabriko "FSO"</u> FSO /Fabryka Samochodów Osobowych w Warszawie/
<u>la komerca centralo "Ars Polona"</u> centrala handlowa "Ars Polona" /zajmuje się eksportem polskich książek, płyt, reprodukcji malarstwa itp./

S ł o w n i c z e k

<u>aĉeti</u> kupić; <u>aha</u> aha; <u>ankoraŭ</u> jeszcze; <u>aŭ</u> lub,

albo; czy; aŭtomobilo samochód; biciklo rower; centralo centrala; ĉambro pokój; donaco podarunek; farti mieć się, czuć się; filo syn; ĝuste właśnie; intervidiĝi zobaczyć się; jam już; kiel jak, jako; komerca handlowy; motorciklo motocykl; paĉjo tatuś, tata; panjo mamusia, mama; por dla; por kiu? dla kogo?; skotero skuter; tagmeze w południe; tute zupełnie, całkowicie

## G R A M A T Y K A

### Słówko ĈU na końcu zdania

Słówko "ĉu" na końcu zdania odpowiada polskim "prawda, nieprawdaż". Stawiamy je na końcu zdania, aby uzyskać potwierdzenie naszej prośby, propozycji, przypuszczenia, domysłu, np.:

| | |
|---|---|
| Morgaŭ vespere, ĉu? | Jutro wieczorem, prawda? |
| Kun Roberto, ĉu? | Z Robertem, prawda? |
| Vi estas studento, ĉu? | Jesteś studentem, prawda? |

Słówko "ĉu" łączy się dość często z przysłówkiem "ne" /ĉu ne?/:

| | |
|---|---|
| Por via filo, ĉu ne? | Dla twojego syna, prawda? |

Uwaga! Obie formy "ĉu" i "ĉu ne" na końcu zdania są równoznaczne.

### Przedrostek GE-

Przedrostek ge- oznacza osoby obojga płci:

patro - ojciec:
gepatroj - rodzice; ojcowie i matki, ojciec i matka;
frato - brat:
gefratoj - rodzeństwo; bracia i siostry, brat i siostra;
edzo - mąż:
geedzoj - małżeństwo, małżonkowie;
amiko - przyjaciel:
geamikoj - przyjaciele /obojga płci/, przyjaciele i przyjaciółki;

instruisto - nauczyciel:
geinstruistoj - nauczyciele /obojga płci/,
nauczyciele i nauczycielki.

Uwaga! Przedrostek ge- dodaje się tylko do rzeczowników rodzaju męskiego; ponieważ słowa z przedrostkiem ge- przedstawiają co najmniej dwie osoby, przyjmują one dodatkowo końcówkę liczby mnogiej.

## Zdania alternatywne

W zdaniach alternatywnych pytających, w których żądamy wyboru jednej z dwóch wykluczających się możliwości, słówko "aŭ" umieszczone w środku zdania przyjmuje znaczenie "czy", np.:

| | |
|---|---|
| Ĉu vi studas, aŭ laboras? | Studiujesz, czy pracujesz? |
| Ĉu li estas instruisto, aŭ oficisto? | On jest nauczycielem, czy urzędnikiem? |
| Ĉu vi volus intervidiĝi kun mi hodiaŭ vespere, aŭ morgaŭ vespere? | Chciałbyś się ze mną zobaczyć dzisiaj wieczorem, czy jutro wieczorem? |

## Ć W I C Z E N I A

I. Wstawić brakujące wyrazy podane po polsku w nawiasie:

1. Vi intencas iri al kinejo _____ /dzisiaj wieczorem/, ĉu ne?
2. Li intencas _____ /pójść do teatru/ morgaŭ vespere, ĉu ne?
3. Ili intencas _____ /pójść do opery/ dimanĉe, ĉu?
4. Vi intencas aĉeti skoteron por via filo, _____ /nieprawdaż/?
5. Si intencas aĉeti biciklon por Roberto, _____ /nieprawdaż/?

**II. Odpowiedzieć na pytania używając w odpowiedzi wyrazów podanych w nawiasie:**

1. Ĉu vi studas aŭ laboras? /studi/ 2. Ĉu ŝi studas aŭ laboras? /labori/ 3. Ĉu li lernas aŭ laboras? /lerni/ 4. Ĉu vi estas aktoro aŭ instruisto?/aktoro/ 5. Ĉu via patro estas oficisto aŭ laboristo? /laboristo/ 6. Ĉu via onklo loĝas en Varsovio aŭ en Krakovo? /Krakovo/ 7. Ĉu via avo loĝas en Zakopane aŭ en Nowy Targ? /Zakopane/ 8. Ĉu via frato studas en Lublino aŭ en Gdansko? /Gdansko/ 9. Ĉu vi laboras kiel oficisto aŭ kiel instruisto? /instruisto/ 10. Ĉu ŝi laboras kiel aktorino aŭ kiel oficistino? /aktorino/

**III. Odpowiedzieć na pytania:**

1. Kie laboras viaj gepatroj? 2. Kie laboras viaj geonkloj? 3. Ĉu viaj gefratoj studas aŭ laboras? 4. Kie laboras viaj geamikoj? 5. Kie lernas /studas/ viaj gekolegoj?

**IV. Z czytanki "EN KRAKOVO" wypisać wyrazy, w których występuje przedrostek oznaczający osoby obojga płci.**

**Lekcja 9**

1. ĈU VI VOLUS TRINKI KAFON?

a/ - Ĉu vi volus trinki kafon?
- Ĉu vi volus trinki teon?
- Ĉu vi volus trinki lakton?
- Ĉu vi volus trinki kakaon?
- Ĉu vi volus trinki kompoton?
  - Jes, mi volus.
  - Ne, mi ne volus.

b/ Tadeo: Ĉu vi ŝatas trinki kafon?
Andreo: Jes, mi ŝatas. Kaj vi?
Tadeo: Mi ankaŭ /ŝatas trinki kafon/.

c/ Halina: Ĉu vi ŝatas trinki lakton?
Andreo: Jes, mi ŝatas. Kaj vi?
Halina: Mi ankaŭ /ŝatas trinki lakton/.

ĉ/ Irena: Ĉu vi ŝatas trinki akvon?
Barbara: Jes, mi ŝatas, sed mi preferas trinki kompoton.
Irena: Kaj vi, Teresa, ĉu vi ŝatas trinki akvon?
Teresa: Ne, mi ne ŝatas trinki akvon. Mi ankaŭ preferas trinki kompoton.

d/ Alina: Ĉu via frato ŝatas trinki mineralan akvon?
Petro: Ne, li ne ŝatas trinki mineralan akvon. Li preferas trinki sodakvon.

O b j a ś n i e n i a

Kaj vi? A ty?
Mi ankaŭ... Ja także...

W z ó r 1:

Ĉu vi ŝatas trinki kafon?

P r z y k ł a d y:

Ĉu vi ŝatas trinki kafon?
Czy lubisz pić kawę?
Ĉu vi ŝatas trinki lakton?
Czy lubisz pić mleko?
Ĉu vi ŝatas trinki sodakvon?
Czy lubisz pić wodę sodową?

W z ó r 2:

Ne, mi ne ŝatas trinki kafon.

P r z y k ł a d y:

Ne, mi ne ŝatas trinki kafon.
Nie, ja nie lubię pić kawy.
Ne, mi ne ŝatas trinki kakaon.
Nie, ja nie lubię pić kakao.

Ne, mi ne ŝatas trinki kompoton.
Nie, ja nie lubię pić kompotu.

## 2. ĈU VI ŜATAS MANĜI FROMAĜON?

a/ - Ĉu vi ŝatas manĝi fromaĝon?
- Ĉu vi ŝatas manĝi ŝinkon?
- Ĉu vi ŝatas manĝi kolbason?
- Ĉu vi ŝatas manĝi buterpanon?
  - Jes, mi ŝatas.
  - Ne, mi ne ŝatas.

b/ - Ĉu vi deziras panon kun butero?
- Ĉu vi deziras panon kun margarino?
- Ĉu vi deziras buterpanon kun ŝinko?
- Ĉu vi deziras buterpanon kun fromaĝo?
- Ĉu vi deziras bulkon kun fromaĝo?
- Ĉu vi deziras bulkon kun butero?
  - Jes, mi petas.

c/ Aleksander: Ĉu vi deziras bulkon kun ŝinko?
Stefano: Jes, mi petas.
Aleksandro: Ĉu vi ankaŭ deziras bulkon kun ŝinko?
Roberto: Ne. Mi petas buterpanon kun fromaĝo.

ĉ/ Sinjorino Kalina: Kion vi deziras manĝi, Karlo?
Karlo: Mi petas buterpanon kun ŝinko.
Sinjorino Kalina: Kaj kion vi deziras manĝi, Barbara?
Barbara: Mi petas bulkon kun butero kaj ŝinko.

### O b j a ś n i e n i a

Ĉu vi deziras buterpanon kun ŝinko?
Czy życzysz sobie chleb z masłem i z szynką?
Uwaga! Po przyimku kun nigdy nie używa się biernika, np.:
Li deziras bulkon /kogo? co?/ kun ŝinko /z kim? czym?/.
On życzy sobie bułkę z szynką.

Mi petas... Proszę... /peti prosić/

W z ó r 3:

Ĉu vi deziras panon kun butero?

P r z y k ł a d y:

Ĉu vi deziras panon kun butero?
Czy życzysz sobie chleb z masłem?
Ĉu vi deziras panon kun ŝinko?
Czy życzysz sobie chleb z szynką?
Ĉu vi deziras bulkon kun fromaĝo?
Czy życzysz sobie bułkę z serem?

3. ĈU VI SOIFAS?

a/ - Danjo, ĉu vi soifas?
- Manjo, ĉu vi soifas?
- Peĉjo, ĉu vi malsatas?
- Joĉjo, ĉu vi malsatas?
- Jes, iomete.

b/ Nina: Danjo, ĉu vi soifas?
Danuta: Jes, iomete.
Nina: Ĉu vi deziras trinki teon?
Danuta: Jes, mi petas.

c/ Irena: Manjo, ĉu vi soifas?
Maria: Jes, iomete.
Irena: Ĉu vi deziras trinki mineralan akvon?
Maria: Jes, mi petas.

ĉ/ Andreo: Joĉjo, ĉu vi malsatas?
Johano: Iomete.
Andreo: Ĉu vi deziras buterpanon kun fromaĝo?
Johano: Jes, mi petas.

d/ Tadeo: Peĉjo, ĉu vi malsatas?
Petro: Iomete.
Tadeo: Ĉu vi deziras bulkon kun kolbaso?
Petro: Jes, mi petas.

e/ - Ĉu vi ne soifas?
- Jes, mi iomete soifas. /Ne, mi ne

soifas./

- Ĉu vi ne malsatas?

- Jes, mi iomete malsatas. /Ne, mi ne malsatas./

O b j a ś n i e n i a

Danjo Danusia /patrz gram. "zdrobnienia imion męskich i żeńskich"/
Jes, iomete. Tak, troszeczkę.
Ĉu vi soifas? /= Ĉu vi estas soifa?/ Czy jesteś spragniony? Czy jesteś spragniona?
Ĉu vi malsatas? /= Ĉu vi estas malsata?/ Czy jesteś głodny? Czy jesteś głodna?
Ĉu vi ne soifas? Czy nie jesteś spragniony? Czy nie jesteś spragniona?
Ĉu vi ne malsatas? Czy nie jesteś głodny? Czy nie jesteś głodna?

4. VESPERMANĜO KUN ONKLO STEFANO KAJ ONKLINO DOROTA

La onklino: Ĉu vi volus trinki teon, Banjo?
Barbara: Jes, mi volus. Mi tre ŝatas teon.
La onklo: Eble vi preferas kakaon?
Barbara: Ne, dankon! Mi preferas trinki teon.
La onklino: Kaj vi, Robĉjo?
Roberto: Mi ankaŭ petas teon.
La onklino: Banjo, ĉu vi ŝatas panon kun fromaĝo?
Barbara: Jes, mi ŝatas, sed mi preferas bulkon kun ŝinko.
La onklo: Kaj vi, Robĉjo, ĉu vi deziras panon kun fromaĝo?
Roberto: Jes, mi petas panon kun fromaĝo. Sed mi ankaŭ povas manĝi panon kun ŝinko. Por mi estas egale.
La onklino: Jen estas pano kun ŝinko, jen estas pano kun fromaĝo kaj jen estas bulko kun konfitaĵo.
Roberto: Mi dankas, onklinjo!

Barbara: Dankon, onĉjo!
Roberto: Vi estas tre kara.j!

O b j a ś n i e n i a

Eble vi preferas...? Może wolisz...?
W języku potocznym bardzo często używa się zwrotów: estas egale i egale /wszystko jedno/.
onklinjo ciocia, onĉjo wujek /patrz gram. "zdrobnienia imion męskich i żeńskich"/

5. PROVERBOJ
/Według L.L. Zamenhofa/

Gasto sen avizo estas agrabla surprizo.
Amiko de amiko estas ankaŭ amiko.

6. KIU PAROLAS?

Taĉjo estas maldiligenta lernanto. Hodiaŭ li ne deziras iri al lernejo. Li preferas resti hejme kaj legi libron. Li decidas telefoni al la instruisto en la lernejo.
Taĉjo: Bonan tagon!
La instruisto: Bonan tagon!
Taĉjo: Taĉjo Komar estas malsana, sinjoro.
La instruisto: Malsana?
Taĉjo: Jes, malsana! Li kuŝas hejme.
La instruisto: Kaj kiu parolas?
Taĉjo: Mia patro.

S ł o w n i c z e k

akvo woda; avizo zawiadomienie; bulko bułka; butero masło; buterpano chleb z masłem; decidi postanowić, zadecydować; eble może; egale jednakowo, tu: wszystko jedno; fromaĝo ser; gasto gość; kafo kawa; kakao kakao; kolbaso kiełbasa; kompoto kompot; konfitaĵo konfitura; lakto mleko; malsata głodny; manĝi jeść; margarino margaryna; minerala mineralny, mineralna; pano chleb; peti prosić; preferi wolec /coś od czegoś/; sata syty, nasycony; sen bez /kogo? czego?/; sodakvo

woda sodowa; soifi mieć pragnienie, odczuwać pragnienie; surprizo niespodzianka; ŝinko szynka; teo herbata; trinki pić; vespermanĝo kolacja

## G R A M A T Y K A

### Zdrobnienie imion męskich i żeńskich

Imiona męskie w pełnym brzmieniu mają końcówkę -o /Petro/, imiona żeńskie końcówkę -a /Eva/. Zdrobnienie nadajemy imionom męskim za pomocą przyrostka -ĉj, np.:

| | |
|---|---|
| Petro - Piotr | Peĉjo - Piotruś |
| Johano - Jan | Joĉjo - Janek |
| Andreo - Andrzej | Anĉjo - Jędruś |

Imionom żeńskim nadajemy zdrobnienie za pomocą przyrostka -nj, np.:

| | |
|---|---|
| Barbara - Barbara | Banjo - Basia |
| Maria - Maria | Manjo - Marysia |
| Danuta - Danuta | Danjo - Danusia |

Przyrostki -ĉj i -nj występują również z rzeczownikami męsko-osobowymi i żeńsko-osobowymi, np.:

| | |
|---|---|
| patro - ojciec | paĉjo - tatuś |
| patrino - matka | panjo - mamusia |
| onklo - wujek | onĉjo - wujaszek |
| onklino - ciotka | onklinjo - ciocia |

### Słowa złożone

Nowe słowa tworzy się w języku esperanto nie tylko za pomocą końcówek części mowy, przedrostków i przyrostków, ale także przez połączenie dwóch lub trzech rdzeni. W tego rodzaju słowach wyraz główny występuje zawsze na drugim miejscu /zawiera on pojęcie zasadnicze/, natomiast wyraz określający występuje przed wyrazem głównym, np.:

| | | |
|---|---|---|
| fromaĝo ser | kuko ciastko | fromaĝkuko sernik |
| vespero wieczór | manĝi jeść | vespermanĝo kolacja |

Dla ułatwienia wymowy, między dwa połączone wyrazy, wstawiemy bardzo często samogłoskę -o, np.:
skribi pisać tablo stół skribotablo - biurko

## ĆWICZENIA

I. Odpowiedzieć na pytania:

1. Ĉu vi ŝatas trinki kafon? 2. Ĉu vi ŝatas trinki kakaon? 3. Ĉu via onklo /avo/ ŝatas trinki lakton? 4. Ĉu via patro /frato/ ŝatas trinki kompoton? 5. Ĉu vi ŝatas buterpanon kun fromaĝo? 6. Ĉu vi ŝatas buterpanon kun ŝinko? 7. Ĉu vi ŝatas bulkon kun margarino? 8. Ĉu vi ŝatas bulkon kun butero?

II. Poniższe zdania przeczące zamienić na twierdzące:

1. Mi ne ŝatas buterpanon kun fromaĝo. 2. Li ne ŝatas panon kun margarino. 3. Ŝi ne ŝatas panon kun ŝinko. 4. Ni ne ŝatas bulkon kun fromaĝo. 5. Ili ne ŝatas kompoton.

III. Odpowiedzieć pełnymi zdaniami, używając w odpowiedzi wyrazów podanych po polsku w nawiasie:

1. Kion vi ŝatas trinki? /kawę/
2. Kion ŝatas trinki sinjoro Komar? /herbatę/
3. Kion ŝatas trinki via patro? /kompot/
4. Kion vi ŝatas manĝi? /chleb z masłem/
5. Kion ŝatas manĝi via onklino? /bułkę z serem/
6. Kion ŝatas manĝi via patrino? /bułkę z szynką/

## Lekcja 10

1. KION VI FARIS HIERAŬ POSTTAGMEZE?

a/ - Kion vi faris hieraŭ posttagmeze?

- Mi lernis Esperanton.
- Mi rigardis televidon.
- Mi aŭskultis radion.
- Mi legis libron.
- Mi lernis matematikon.
- Mi skribis leteron.

b/ - Kion faris hieraŭ vespere via frato?
- Li iom promenis.
- Li iom lernis.
- Li iom legis.

- Kion faris hieraŭ vespere via fratino?
- Ŝi lernis Esperanton.
- Ŝi legis libron.
- Ŝi legis gazeton.

c/ Tadeo: Bonan tagon!
Roberto: Bonan tagon!
Tadeo: Kial vi ne telefonis al mi hieraŭ posttagmeze?
Roberto: Bedaŭrinde mi ne povis. Mi estis en kinejo.
Tadeo: Jes, sed vi povis telefoni al mi vespere!
Roberto: Kiel mi jam ĉiris al vi, mi iris al kinejo. Poste mi iom promenis kun mia patro. Vespere mi tre malbone fartis, mi estis malsana kaj mi ne povis telefoni al vi.
Tadeo: Kaj kiel vi nun fartas?
Roberto: Nun mi jam fartas bone.

O b j a ś n i e n i a

Kion vi faris...? Co porabiałeś...? /patrz gram. "czas przeszły"/
Li iom promenis. On trochę spacerował. /patrz gram. "zaimek przysłowny IOM"/

W z ó r 1:

Kion faris hieraŭ vespere via frato?

P r z y k ł a d y:

Kion faris hieraŭ vespere via frato?
Co robił wczoraj wieczorem twój brat?
Kion faris hieraŭ matene via frato?
Co robił wczoraj rano twój brat?
Kion faris hieraŭ tagmeze via frato?
Co robił wczoraj w południe twój brat?

## 2. KIAM VI ESTIS EN KINEJO?

a/ - Kiam vi estis en kinejo?
- Lunde posttagmeze.
- Marde posttagmeze.
- Merkrede vespere.
- Ĵaŭde vespere.

- Kiam vi estis en operejo?
- Vendrede vespere.
- Sabate vespere.
- Dimanĉe vespere.

b/ Barbara: Kiam vi estis en Krakovo?
Halina: Merkrede.
Barbara: Ĉe kiu vi estis?
Halina: Mi estis ĉe mia avo.
Barbara: Ĉu vi ankaŭ estis en Wieliczka?
Halina: Jes, tie mi ankaŭ estis.

c/ Adela: Kion vi faris antaŭhieraŭ vespere?
Stefano: Mi iom promenis kaj poste mi iom legis. Sed, kial vi demandas min pri tio?
Adela: Tial, ke mi telefonis al vi antaŭhieraŭ vespere kaj via frato diris al mi, ke vi forveturis al Krakovo.
Stefano: Mi? Mi forveturis al Krakovo?
Adela: Tiel diris al mi via frato.
Stefano: Oĥ, li malbone informis vin. Al Krakovo forveturis mia patro.

O b j a ś n i e n i a

Jes, tie mi ankaŭ estis. Tak, tam również byłam.

Ĉe kiu...? U kogo...?
Via frato diris al mi, ke... twój brat powiedział mi, że...
Tiel diris al mi... Tak powiedział mi...

3. ĈU VI JAM ESTIS EN VARSOVIO?

a/ Karlo: Ĉu vi jam estis en Varsovio?
Tadeo: Ankoraŭ ne. Kaj vi?
Karlo: Mi jam estis en Varsovio. Kaj ĉu vi jam estis en Gdansko?
Tadeo: Jes, mi jam estis tie.
Karlo: Kiam?
Tadeo: Pasintjare.
Karlo: Mi ankaŭ estis tie pasintjare.

b/ Celina: Ĉu vi jam estis en la varsovia Teatro la Granda?
Renata: Ankoraŭ ne. Kaj vi, Celina?
Celina: Jes, mi jam estis en ĝi.
Renata: Kiam?
Celina: Pasintsemajne. Ĉu vi ne ŝatas teatron?
Renata: Ho, mi ŝatas. Mi tre ŝatas.
Celina: Kiam vi estis lastfoje en teatro?
Renata: Lastfoje? Hmm... Lastfoje en teatro mi estis pasintmonate.
Celina: En kiu teatro vi estis?
Renata: Mi estis en la teatro je la nomo de Stefan Jaracz.
Celina: En la teatro "Ateneum"?
Renata: Jes, en la teatro "Ateneum".

O b j a ś n i e n i a

ankoraŭ ne jeszcze nie
Mi jam estis... /Ja/ już byłem...
pasintjare = en la pasinta jaro w ubiegłym roku
/pasinta ubiegły, ten, który minął; jaro rok/
Teatro la Granda Teatr Wielki
Uwaga! W nazwach, w których występuje epitet, stawiamy - bezpośrednio przed tym epitetem - przedimek określony la, np.:

Aŭgusto la Forta - August Mocny
Frederiko la Granda - Fryderyk Wielki

pasintsemajne = en la pasinta semajno w ubiegłym tygodniu

lastfoje po raz ostatni, ostatnim razem

pasintmonate = en la pasinta monato w ubiegłym miesiącu

Uwaga! Obie formy są równorzędne!

4. RENKONTIĜO KUN TADEO.

Roberto denove estas en Varsovio. En la strato Nowy Świat li renkontiĝas kun sia amiko - Tadeo.

Tadeo: Bonan tagon!
Roberto: Bonan tagon, Taĉjo!
Tadeo: Mi aŭdis, ke vi estis en Krakovo.
Roberto: Jes, mi estis tie kun mia fratino Barbara.
Tadeo: Ĉe kiu vi estis?
Roberto: Ĉe kiu? Mi estis ĉe mia onklo Stefano kaj mia onklino Dorota.
Tadeo: Ĉe kiu strato loĝas viaj geonkloj?
Roberto: Ili loĝas ĉe la strato Długa.
Tadeo: Kiel plaĉis al vi Krakovo? Ĉu vi estas kontenta, ke vi estis en Krakovo?
Roberto: Mi estas tre kontenta. Kaj Krakovo tre plaĉis al mi. Ĝi estas tre bela urbo.
Tadeo: Jes, ĝi estas tre bela urbo. En la domoj kaj en la stratoj de la urbo loĝas la historio de Pollando. Kion vi faris en Krakovo, Robĉjo?
Roberto: Lunde mi estis en muzeo...
Tadeo: ... en kiu muzeo?
Roberto: En la Historia Muzeo. Lunde mi ankaŭ estis en la Domo de Matejko. Marde mi estis en la kastelo "Wawel". Ĉu vi estis en la kastelo "Wawel", Taĉjo?
Tadeo: Ho, jes, mi estis en la kastelo. Mi estis tie pasintjare. Kaj kion vi faris merkrede?

Roberto: Mi estis en la teatro je la nomo de Juliusz Słowacki.

Tadeo: Kaj ĵaŭde?

Roberto: Ĵaŭde? Ĵaŭde mi estis en Wieliczka.

Tadeo: Kaj kion vi faris vendrede kaj sabate?

Roberto: Vendrede mi estis ĉe mia avo kaj mia avino.

Tadeo: Do viaj geavoj ankaŭ loĝas en Krakovo?

Roberto: Ne, ili ne loĝas en Krakovo. Ili loĝas en Nowa Huta apud Krakovo. Mi iom promenis en la stratoj de Nowa Huta. Ĝi ankaŭ estas tre bela urbo.

Tadeo: Kaj sabate?

Roberto: Sabate mi estis kune kun mia onklo en la Jagjellona Universitato. Poste mi iom promenis en la stratoj de la urbo.

Tadeo: Ĉu vi estis en krakova operejo?

Roberto: Jes, mi estis en ĝi /en la operejo/ dimanĉe vespere.

O b j a ś n i e n i a

denove ponownie, znowu
kun sia amiko ze swoim przyjacielem
Mi aŭdis, ke... Słyszałem, że...
Ĉe kiu...? U kogo...?
Ĉu vi estas kontenta, ke... Czy jesteś zadowolony, że...
la historio de Pollando historia Polski /Pollando Polska/
je la nomo imienia; je la nomo de Juliusz Słowacki imienia Juliusza Słowackiego

5. LETERO

Kara Joĉjo!

En la pasinta semajno mi estis ĉe miaj geonkloj en Krakovo. Krakovo tre plaĉis al mi. Ĝi estas tre bela urbo. Mi estis en la kastelo "Wawel", en muzeoj, en teatroj, en la Jagjellona Universitato. Mi estis en la preĝejo je la nomo de la Sankta

Maria, kie troviĝas la fama altaro de Wit Stwosz. Mi ankaŭ estis en la muzeo "Sukiennice" sur la urboplaco de Krakovo, kie troviĝas la fama pentraĵo de Jan Matejko "Kościuszko apud Racławice".

Joĉjo! Mi volus renkontiĝi kun vi sabato posttagmeze, ĉar mi deziras rakonti al vi pri mia vizito en Krakovo kaj ankaŭ pri Wieliczka kaj Nowa Huta.

Via amiko

Roberto

O b j a ś n i e n i a

en la preĝejo w kościele /preĝi modlić się, preĝ+ej+o - preĝejo/
Sankta Maria Święta Maria /chodzi o kościół Najświętszej Marii Panny w Krakowie /Kościół Mariacki/, gdzie znajduje się ołtarz Wita Stwosza/
la fama altaro słynny ołtarz /fama słynny, sławny; altaro ołtarz/
urboplaco rynek /placo plac/
pentraĵo malowidło, obraz
rakonti al vi opowiedzieć ci

6. MI NE SCIAS.

Instruisto: Ĉu vi scias, kiu frazo estas tre populara en lernejo?
Petro: Mi ne scias, sinjoro instruisto.
Instruisto: Ĝuste. Vi tre bone respondis.

7. VIZITO ĈE AVINJO.

La gelernantoj skribis pri la temo: "Vizito ĉe avinjo". En la kajero de Taĉjo estis nur unu frazo "La avinjo forveturis.".

O b j a ś n i e n i a

Ĉu vi scias? Czy wiesz? /scii wiedzieć/
Mi ne scias. Nie wiem.
kiu frazo które zdanie
tre populara bardzo popularny, bardzo popularna,

bardzo popularne
skribi pri la temo pisać na temat /temo temat/
estis nur unu frazo było tylko jedno zdanie
/nur tylko/

### S ł o w n i c z e k

altaro ołtarz; antaŭhieraŭ przedwczoraj; aŭdi słyszeć; denove znowu, ponownie, od nowa; fama sławny, słynny; frazo zdanie; granda duży; hieraŭ wczoraj; informi /po/informować; iom trochę, nieco; jaro rok; je la nomo imienia; ĵaŭde w czwartek; kajero zeszyt; kastelo zamek /gród/; kontenta zadowolony; krakova krakowski; lastfoje po raz ostatni, ostatnim razem;, lunde w poniedziałek; marde we wtorek; merkrede we środę; monato miesiąc; muzeo muzeum; nur tylko, jedynie; oĥ! och!; pasinta ubiegły; pasintjare w ubiegłym roku; pasintmonate w ubiegłym miesiącu; pasintsemajne w ubiegłym tygodniu; pentraĵo malowidło, obraz; placo plac; plaĉi podobać się; Pollando Polska; populara popularny; poste potem; preĝejo kościół; promeni spacerować; rakonti opowiadać; sabate w sobotę; scii wiedzieć; semajno tydzień; temo temat; tie tam; tiel tak, w ten sposób; unu jeden; urboplaco rynek; vendrede w piątek

## G R A M A T Y K A

### Czas przeszły

Słowo osobowe czasu przeszłego charakteryzuje się stałą końcówką -is, np.: /legi czytać/

l i c z b a   p o j e d y n c z a

mi legis - czytałem
vi legis - czytałeś
li legis - on czytał
ŝi legis - ona czytała
ĝi legis - on, ona, ono czytało

**l i c z b a   m n o g a**

ni legis - czytaliśmy
vi legis - czytaliście
ili legis - oni czytali,
one czytały

**Nazwy dni tygodnia**

Od nazwy dnia tworzy się okolicznik czasu za pomocą końcówki -e, np.:

| | |
|---|---|
| lundo - poniedziałek | lunde - w poniedziałek |
| mardo - wtorek | marde - we wtorek |
| merkredo - środa | merkrede - w środę |
| ĵaŭdo - czwartek | ĵaŭde - w czwartek |
| vendredo - piątek | vendrede - w piątek |
| sabato - sobota | sabate - w sobotę |
| dimanĉo - niedziela | dimanĉe - w niedzielę |

## Ć W I C Z E N I A

I. Zamiast bezokolicznika wstawić właściwe formę czasu przeszłego:

1. Lunde mi /rigardi/ televidon. 2. Marde mi /lerni/ Esperanton. 3. Merkrede li /esti/ en Vroclavo. 4. Ĵaŭde ŝi /esti/ en Zakopane. 5. Vendrede ni /renkontiĝi/ kun gesinjoroj Nowak. 6. Sabate ili /forveturi/ al Bydgoszcz. 7. Dimanĉe ni /resti/ hejme kaj /rigardi/ televidon.

II. Ułożyć pytania do następujących zdań oznajmujących:

w z ó r: Hieraŭ vespere mi estis en teatro.
Kie vi estis hieraŭ vespere?
lub: Kiam vi estis en teatro?

1. Hieraŭ posttagmeze mi estis en kinejo.
2. Hieraŭ vespere li rigardis televidon.
3. Hieraŭ matene ni estis en lernejo.
4. Lunde posttagmeze sinjorino Malvina legis libron.

5. Merkrede tagmeze sinjoro Tadeo forveturis al Parizo.
6. Sabate vespere li trinkis teon kaj manĝis buterpanon.
7. Dimanĉe matene ŝi trinkis lakton kaj manĝis bulkon kun fromaĝo.
8. Hodiaŭ matene miaj gepatroj forveturis al Sopot.

III. Odpowiedzieć na pytenia:

1. Ĉu vi jam estis en Krakovo? 2. Ĉu via frato /fratino/ jam estis en Krakovo? 3. Ĉu vi estis en la kastelo "Wawel"? 4. Ĉu vi estis en la preĝejo je la nomo de la Sankta Maria? 5. Ĉu vi estis en la teatro je la nomo de Juliusz Słowacki? 6. Ĉu vi estis en Wieliczka? 7. Ĉu vi estis en Nowa Huta? 8. Kiam vi estis en Krakovo? 9. Kion vi faris en Krakovo?

IV. Napisać kilka zdań o wycieczce do dużego miasta.

Lekcja 11

1. KIEN VI IRAS?

a/ Georgo: Bonan tagon!
Sigismundo: Bonan tagon!
Georgo: Kio nova ĉe vi? Kie vi nun laboras?
Sigismundo: Mi laboras en la Varsovia Politekniko.
Georgo: En la Varsovia Politekniko? Mi ankaŭ laboras tie.
Sigismundo: Ĉu vere?
Georgo: Jes, vere. Mi laboras tie kiel oficisto. Kaj vi?
Sigismundo: Mi laboras tie kiel asistanto de profesoro.
Georgo: Mi gratulas al vi.

Sigismundo: Dankon! Pardonu, kien vi nun iras?
Georgo: Mi iras al la Politekniko.
Sigismundo: Mi ankaŭ iras tien.
Georgo: Do ni povas iri kune.
Sigismundo: Bone.

b/ Albina: Mi volus interparoli kun via frato. Ĉu vi scias, kie li nun estas?
Barbara: Li estas hejme.
Albina: Hejme? Kaj kien vi nun iras?
Barbara: Mi ĝuste iras hejmen.
Albina: Hejmen? Ĉu vi povas diri al via frato, ke mi volus interparoli kun li?
Barbara: Jes, komprenebLe!
Albina: Mi dankas al vi!
Barbara: Ne dankinde!
Albina: Do, mi jam devas iri. Ĝis revido!
Barbara: Ĝis revido!

O b j a ś n i e n i a

Kio nova ĉe vi? Co nowego u ciebie?
Ĉu vere? Naprawdę? /dosł. Czy naprawdę?/
Jes, vere. Tak, naprawdę.
kien? dokąd?
tien tam, w tamtym kierunku
hejmen do domu
Ne dankinde! Nie ma za co /dziękować/!
Uwaga! "Ne dankinde!" używa się w odpowiedzi na podziękowanie "Dankon! lub "Mi dankas".

W z ó r 1:

Ĉu vi scias, kie li nun estas?

P r z y k ł a d y:

Ĉu vi scias, kie li nun estas?
Czy wiesz, gdzie on teraz jest?
Ĉu vi scias, kie li nun loĝas?
Czy wiesz, gdzie on teraz mieszka?

Ĉu vi scias, kie li nun laboras?
Czy wiesz, gdzie on teraz pracuje?
Ĉu vi scias, kie li nun studas?
Czy wiesz, gdzie on teraz studiuje?

W z ó r 2:

Mi laboras tie kiel oficisto.

P r z y k ł a d y:

Mi laboras tie kiel oficisto.
Pracuję tam jako urzędnik.
Mi laboras tie kiel instruisto.
Pracuję tam jako nauczyciel.
Mi laboras tie kiel instruistino.
Pracuję tam jako nauczycielka.

2. IRU KUN MI AL KINEJO!

a/ - Iru kun mi al kinejo!
- Iru kun mi al kafejo!
- Iru kun mi al operejo!
- Iru kun mi al vendejo!
- Iru kun mi al teotrinkejo!
- Bedaŭrinde mi ne povas. Mi estas tre okupita.

b/ Agnesa: Bonan tagon!
Monika: Bonan tagon!
Agnesa: Kien vi iras?
Monika: Mi iras al poŝtoficejo.
Agnesa: Ho, tre bone. Aĉetu por mi du kovertojn, du poŝtmarkojn kaj tri bildkartojn.
Monika: Bone.
Agnesa: Mi dankas al vi, Monika!
Monika: Ne dankinde!

c/ Andreo: Pardonu, ĉu vi nun estas okupita?
Tomaso: Mi ne estas okupita, mi estas tute libera.
Andreo: Do ni iru al kinejo, bone?
Tomaso: Bone, sed...

Andreo: ... sed?

Tomaso: Sed eble ni telefonu al Roberto. Li ankaŭ iru kune kun ni.

Andreo: Mi ne scias, ĉu hodiaŭ li estas libera. Sed telefonu kaj demandu! Aha, demandu, ĉu la fratinoj de Roberto estas liberaj. Ili ankaŭ iru kune kun ni!

Tomaso: Bone.

### O b j a ś n i e n i a

iru! chodź! /patrz gram. "tryb rozkazujący"/
teotrinkejo herbaciarnia /teo+trink+ej-o/
poŝtoficejo urząd pocztowy; poŝto poczta /instytucja/; poŝt+ofic+ej-o

W z ó r 3:

Li iru kun via patro!

P r z y k ł a d y:

Li iru kun via patro!
Niech on pójdzie z twoim ojcem!
Ŝi iru kun via patro!
Niech ona pójdzie z twoim ojcem!
Ni iru kun via patro!
Chodźmy z twoim ojcem!
Ili iru kun via patro!
Niech oni /one/ pójdą z twoim ojcem!

### 3. RENKONTIĜO KUN MIROSLAVO.

Miroslavo: Saluton, Roberto!
Roberto: Saluton, Miroslavo!
Miroslavo: Kien vi iras?
Roberto: Hejmen. Kaj vi?
Miroslavo: Mi iras al stadiono. Iru kun mi!
Roberto: Ĉu vi intencas ludi pilkon?
Miroslavo: Jes, mi intencas.
Roberto: Kun kiu?
Miroslavo: Kun Karlo, Stefano, Johano kaj Andreo. Do, ĉu vi volus ludi kun ni?

Roberto: Mi volus ludi kun vi, sed hodiaŭ mi ne povas.

Miroslavo: Vi ne povas? Kial?

Roberto: Mi ne povas, ĉar mi devas lerni fizikon.

Miroslavo: Ne lernu fizikon! Iru kun mi! Ni iomete ludu pilkon!

Roberto: Vere, mi ne povas. Cetere mi estas laca kaj iomete malsana.

Miroslavo: Domaĝe!

Roberto: Kion fari, mi vere ne povas!

O b j a ś n i e n i a

Saluton! Cześć! Czołem! Witaj! Witajcie!
ludi pilkon grać w piłkę
cetere zresztą
kion fari dosł. co robić /zwrot ten jest odpowiednikiem polskiego "trudno", "niestety", "no cóż", przy wyrażaniu ubolewania/

4. LETERO.

Kara amiko!

Mi skribas al vi leteron, ĉar mi volus korespondi kun vi en Esperanto. Mi estas lernanto kaj mi lernas en teknikumo. Mi kaj miaj gepatroj loĝas en Varsovio en la centro de la urbo. Varsovio estas tre bela kaj tre granda urbo kaj mi estas tre kontenta, ke mi loĝas en ĝi. Mi interesiĝas pri filatelo, skoltismo kaj turismo. Mi kolektas poŝtmarkojn kaj bildkartojn. Ĉu vi ankaŭ interesiĝas pri filatelo kaj turismo? Mi volus interŝanĝi kun vi poŝtmarkojn, alumet-etikedojn kaj bildkartojn kaj ankaŭ mi volus interŝanĝi kun vi turismajn prospektojn, fotografaĵojn de famaj aktoroj kaj aktorinoj kaj ilustritajn revuojn. Skribu al mi, kiel plaĉas al vi mia propono!

Via nova amiko
Roberto

O b j a ś n i e n i a

Mi interesiĝas pri filatelo... Interesuję się filatelistyką...
Mi volus interŝanĝi kun vi... Chciałbym wymieniac z tobą...
interŝanĝi turismajn prospektojn wymieniać prospekty turystyczne
interŝanĝi ilustritajn revuojn wymieniać ilustrowane czasopisma

5. RAKONTO.

Roberto estas knabo. Li estas lernanto kaj li lernas en teknikumo. Roberto kaj la gepatroj de Roberto loĝas en Varsovio. La frato de Roberto estas studento kaj la fratino de Roberto estas studentino. Roberto ŝatas ludi pilkon. Li ankaŭ ŝatas ludi ŝakon. La frato de Roberto ŝatas ludi pianon. Li tre bone ludas pianon. Roberto interesiĝas pri turismo kaj filatelo. Li kolektas bildkartojn kaj poŝtmarkojn kaj ankaŭ turismajn prospektojn. La fratino de Roberto ne kolektas poŝtmarkojn kaj bildkartojn, ŝi kolektas ilustritajn revuojn kaj fotografaĵojn de famaj aktoroj kaj aktorinoj.

O b j a ś n i e n i a

ludi ŝakon grać w szachy /ŝako szachy/
ludi pianon grać na pianinie /ludi fortepianon grać na fortepianie/
Uwaga! Bardzo często używa się złożeń typu "ŝakludi" /grać w szachy = ludi ŝakon/, "pianludi" /grać na pianinie = ludi pianon/

6. MALGRANDA DONACO.

Barbara diras al sia kolegino:
- Jen estas malgranda donaco por vi. Mi aĉetis por vi lernolibron de dancoj. La titolo

de la lernolibro estas "Oliver Twist".

7. ĈU MI JAM POVAS DORMI?

Patrino rakontas vespere al sia malgranda filo fabelon.

- Panjo! - diras la filo.
- Jes?
- Panjo, ĉu mi jam povas dormi, aŭ vi ankoraŭ deziras iom paroli?

S ł o w n i c z e k

asistanto asystent; ĉu vere? naprawdę; danco taniec; danci tańczyć; domaĝe szkoda /jaka szkoda/; dormi spać; gratuli gratulować; fabelo bajka; fortepiano fortepian; fotografaĵo fotografia; ilustrita ilustrowany; interŝanĝi wymieniać, wymienić; komprenebla oczywiście, rozumie się; lernolibro podręcznik; libera wolny, swobodny; ne dankinde nie ma za co /dziękować/; nova nowy; piano pianino; prospekto prospekt /np. turystyczny/; revuo czasopismo; ŝako szachy:, teotrinkejo herbaciarnia; tien tam, w tamtym kierunku; titolo tytuł; tri trzy; turisma turystyczny; vendejo sklep; vere naprawdę

G R A M A T Y K A

Biernik dla oznaczania kierunku

Biernik esperancki służy m.in. do wskazania kierunku:

| | |
|---|---|
| kie? - gdzie? | kien? - dokąd? |
| hejme - w domu | hejmen - do domu |
| tie - tam | tien - tam, w tamtym kierunku |

Tryb rozkazujący

Formę trybu rozkazującego tworzy się za pomocą końcówki -u:

l i c z b a   p o j e d y n c z a

| | |
|---|---|
| mi skribu | niech ja piszę |
| skribu | pisz |
| li skribu | niech on pisze |
| ŝi skribu | niech ona pisze |
| ĝi skribu | niech ono pisze |

l i c z b a   m n o g a

| | |
|---|---|
| ni skribu | piszmy |
| skribu | piszcie |
| ili skribu | niech oni /one/ piszą |

Uwaga! W drugiej osobie liczby pojedynczej i mnogiej nie stawiamy zaimka osobowego /o ile na zaimek osobowy nie pada akcent logiczny!/, natomiast w pozostałych osobach - jak widzimy na powyższych przykładach - zaimki osobowe są niezbędne do pełnego sprecyzowania myśli.

Ć W I C Z E N I A

I. Czasowniki podane w nawiasie zamienić na formę trybu rozkazującego:

1. /Skribi/ al mi leteron! 2. /Iri/ kun mi al teatro! 3. Li /iri/ nun al vendejo! 4. Ŝi /aĉeti/ por mi du poŝtmarkojn. 5. Ni /rigardi/ televidon! 6. Ili /forveturi/ al Krakovo!

II. Zdania powstałe w wyniku ćwiczenia I przetłumaczyć na język polski.

III. Przetłumaczyć na język polski.

1. Kie vi laboras? - Mi laboras tie, en la lernejo je la nomo de Ludwik Zamenhof.
2. Kien vi iras? - Mi iras tien, al la lernejo.
3. Kie nun estas via frato? - Li estas hejme.

4. Kien vi nun iras? - Mi iras hejmen.

IV. Odpowiedzieć na pytania:

1. Ĉu vi ŝatas ludi ŝakon? 2. Ĉu vi ŝatas ludi pianon? 3. Kion vi ŝatas ludi? 4. Kion ŝatas ludi via frato /fratino, patro, patrino/? 5. Kion ŝatas ludi via kolego /kolegino, amiko, amikino/?

Lekcja 12

1. ĈU VI VOLUS HAVI SKOTERON?

a/ - Ĉu vi volus havi skoteron?
- Ĉu vi volus havi biciklon?
- Ĉu vi volus havi fortepianon?
- Ĉu vi volus havi buŝharmonikon?
- Ĉu vi volus havi propran aŭtomobilon?
- Ĉu vi volus havi propran hundon?
- Jes, mi volus.
- Ne, mi ne volus.

b/ - Ĉu via frato havas propran skoteron?
- Ĉu via fratino havas propran gitaron?
- Ĉu via kolego havas propran magnetofonon?
- Ĉu via kolegino havas propran pupon?
- Jes, li /ŝi/ havas.
- Ne, li /ŝi/ ne havas.

c/ Tadeo: Ĉu Roberto havas propran gitaron?
Andreo: Ne, li ne havas propran gitaron, sed lia frato havas propran gitaron.

d/ Tomaso: Ĉu Tadeo havas propran skoteron?
Karlo: Ne, li ne havas propran skoteron, sed lia kolego havas propran skoteron.

e/ Agnesa: Ĉu Irena havas magnetofonon?
Sabina: Ne, ŝi ne havas magnetofonon, sed ŝia fratino havas magnetofonon.

c/ Malina: Ĉu Agnesa havas pupon?
Irena: Ne, ŝi ne havas pupon, sed ŝia kolegino havas pupon.

O b j a ś n i e n i a

bavi skoteron mieć skuter
Ĉu vi havas propran gitaron? Czy masz własną gitarę?
lia frato jego brat; lia jego /patrz gram. "zaimki dzierżawcze przymiotnikowe"/
Ŝia fratino jej siostra; Ŝia jej

W z ó r 1:

Lia frato havas gitaron.

P r z y k ł a d y:

Lia frato havas gitaron.
Jego brat ma gitarę.
Ŝia fratino havas magnetofonon.
Jej siostra ma magnetofon.
Mia kolego havas motorciklon.
Mój kolega ma motocykl.
Via kolegino havas pupon.
Twoja koleżanka ma lalkę.

W z ó r 2:

Ne, mi ne havas propran biciklon.

P r z y k ł a d y:

Ne, mi ne havas propran biciklon.
Nie, ja nie mam własnego roweru.
Ne, mi ne havas propran gitaron.
Nie, ja nie mam własnej gitary.
Ne, mi ne havas propran pupon.
Nie, ja nie mam własnej lalki.

2. ĈU VI SCIPOVAS LUDI GITARON?

a/ - Ĉu vi scipovas ludi gitaron?
- Ĉu vi scipovas ludi violonon?
- Ĉu vi scipovas ludi pianon?

- Ĉu vi scipovas danci tviston?
- Ĉu vi scipovas danci tangon?
- Ĉu vi scipovas danci valson?
- Ĉu vi scipovas danci fokstroton?
  - Jes, mi scipovas.
  - Ne, mi ne scipovas.

b/ Aleksandro: Ĉu via patro scipovas konduki skoteron?
Karlo: Jes, nia patro scipovas konduki skoteron.
Petro: Nia patro scipovas ankaŭ konduki aŭtomobilon.
Aleksandro: Kaj ĉu via patrino scipovas konduki aŭtomobilon?
Karlo: Mi ne scias, ĉu nia patrino scipovas konduki aŭtomobilon.
Petro: Ne, ŝi ne scipovas konduki aŭtomobilon.

c/ Regina: Ĉu Karlo kaj Petro scipovas konduki aŭtomobilon?
Agnesa: Ne, ili ne scipovas konduki aŭtomobilon.
Regina: Kaj ĉu ilia patro scipovas konduki aŭtomobilon?
Agnesa: Ne, ilia patro ne scipovas konduki aŭtomobilon. Ilia patro scipovas konduki nur skoteron.

ĉ/ Henriko: Ĉu vi scipovas danci oberkon?
Johano: Mi ne scipovas, sed mi scipovas danci tviston.
Henriko: Kaj ĉu vi scipovas ludi gitaron?
Johano: Bedaŭrinde ankoraŭ ne.

## O b j a ś n i e n i a

ludi violonon grać na skrzypcach /violono skrzypce/
Cu vi scipovas...? Czy potrafisz...?
via patro wasz ojciec; via wasz
nia patro nasz ojciec; nia nasz

ilia patro   ich ojciec; ilia   ich
konduki aŭtomobilon   prowadzić samochód

3. NOVAJ FOTOGRAFAĴOJ.

Sinjoro Johano - la patro de Roberto, sinjorino Kalina - la patrino de Roberto nun estas hejme. Hejme estas ankaŭ Barbara kaj Roberto. La gepatroj kaj iliaj gefiloj rigardas fotografaĵojn. Ili rigardas novajn fotografaĵojn de la familio kaj albumojn kun malnovaj fotografaĵoj de la familio.

La patro: Jen estas fotografaĵo de onklo Alfredo.
Roberto: Ĉu li estas tiu onklo, kiu havas aŭtomobilon?
La patro: Jes. Ho, ĉi tie estas alia fotografaĵo de onklo Alfredo. Sur tiu ĉi fotografaĵo li troviĝas apud sia aŭtomobilo.
Roberto: Ho, jes. Ĉu ĝi estas "Syrenka"?
La patro: Jes, ĝi estas "Syrenka".
Barbara: Mi vidas, ke en la aŭtomobilo sidas la onklino.
Roberto: Ĉu nia onklino ankaŭ scipovas konduki aŭtomobilon?
La patro: Jes, ŝi ankaŭ scipovas konduki aŭtomobilon.
La patrino: Rigardu, Banjo! Rigardu, Robĉjo! Ĉi tie sur la fotografaĵo estas via kuzo - Marko.
Barbara: Ho, li tenas gitaron.
La patrino: Li ludas gitaron. Via kuzo tre bone ludas gitaron.
Roberto: Ĉu li ludas gitaron en orkestro?
La patrino: Mi ne scias, sed mi aŭdis, ke li tre bone ludas. Li ankaŭ tre bone ludas pianon kaj buŝharmonikon.
La patro: Li estas tre talenta knabo.
Barbara: Panjo, kaj kiu estas ĉi tie?
La patrino: Tiu ĉi malgranda knabino kun pupo?

Barbara: Jes, ĝuste.

La patrino: Ŝi estas via kuzino - Danjo.

Roberto: Ho, mi scias, ŝia patro estis ĉe ni pasintmonate.

La patrino: Jes, ĝuste. Ŝia patro estis nia gasto en la pasinta monato. Ho, rigardu! Ĉi tie estas la patro de Danjo kaj lia edzino.

La patro: Kaj ĉi tie estas ilia domo. Ili havas tre belan domon, ĉu ne?

Barbara: Jes, ilia domo estas tre bela.

Roberto: Ili loĝas en la vilaĝo Kobyłka Dolna, ĉu ne?

La patro: Jes.

Barbara: Kie ĝi troviĝas?

La patro: Ĝi troviĝas apud Kielce.

Roberto: Ĉu tiu ĉi domo estas ilia propra?

La patro: Jes, ĝi estas ilia propra domo.

O b j a ś n i e n i a

ĉi tie  tutaj
tiu ĉi  ten
li tenas gitaron  on trzyma gitarę /teni trzymać/

## 4. MI SCIPOVAS SKRIBI.

Mały Piotruś wraca do domu po swojej pierwszej lekcji w szkole.

- Panjo!
- Jes, filĉjo?
- Mi scipovas skribi! Mi scipovas skribi!
- Vi scipovas skribi?
- Jes, mi scipovas skribi.
- Kion vi scipovas skribi?
- Mi ne scias.
- Vi ne scias?
- Jes, ĉar mi ankoraŭ ne scipovas legi.

O b j a ś n i e n i a

Jes, filĉjo? Tak, syneczku? Słucham, syneczku?

## Słowniczek

<u>alia</u> inny; <u>buŝharmoniko</u> organki; <u>elektra</u> elektryczny; <u>fokstroto</u> fokstrot; <u>gitaro</u> gitara; <u>hundo</u> pies; <u>konduki</u> prowadzić; <u>kuzo</u> kuzyn; <u>literaturo</u> literatura; <u>magnetofono</u> magnetofon; <u>megafono</u> megafon, głośnik; <u>moderna</u> nowoczesny; <u>multaj</u> liczne, liczni, wiele, wielu; <u>muro</u> ściana, mur; <u>najbaro</u> sąsiad; <u>ofte</u> często; <u>orkestro</u> orkiestra; <u>propra</u> własny; <u>pupo</u> lalka; <u>scipovi</u> potrafić; <u>simfonia</u> symfoniczny; <u>talenta</u> utalentowany; <u>tango</u> tango; <u>teni</u> trzymać; <u>tie ĉi = ĉi tie</u> tutaj; <u>tiu ĉi = ĉi tiu</u> ten; <u>tvisto</u> twist; <u>valso</u> walc; <u>violono</u> skrzypce

## GRAMATYKA

### Zaimki dzierżawcze przymiotnikowe

Zaimki dzierżawcze przymiotnikowe tworzy się przez dodanie końcówki przymiotnikowej "-a" do zaimka osobowego:

mi + a = <u>mia</u> mój, moja, moje
vi + a = <u>via</u> twój, twoja, twoje
li + a = <u>lia</u> jego
ŝi + a = <u>ŝia</u> jej
ĝi + a = <u>ĝia</u> jego, jej /w odniesieniu do przedmiotów, zwierząt itp./
ni + a = <u>nia</u> nasz, nasza, nasze
vi + a = <u>via</u> wasz, wasza, wasze
ili + a = <u>ilia</u> ich

Zaimki dzierżawcze przymiotnikowe odmieniają się podobnie jak przymiotniki. W liczbie mnogiej przyjmują końcówkę -<u>j</u>, np.:

mia + j = <u>miaj</u> moi, moje
nia + j = <u>niaj</u> nasi, nasze

W bierniku liczby pojedynczej i mnogiej przyjmują końcówkę -<u>n</u>, np.:

Hieraŭ mi vidis via<u>n</u> patro<u>n</u>.

Wczoraj widziałem twojego ojca.
Hieraŭ mi vidis viajn gepatrojn.
Wczoraj widziałem twoich rodziców.

## Słówko ĈI

Słówko ĉi nie ma samodzielnego znaczenia, wskazuje ono zbliżenie:

tiu - tamten    tiu ĉi, ĉi tiu - ten
tie - tam    tie ĉi, ĉi tie - tutaj

Uwaga! Słówko ĉi występuje przed lub po zaimku.

## Ć W I C Z E N I A

### I. Zamienić na liczbę mnogą:

1. Mia frato estas lernanto. 2. Via fratino estas studentino. 3. Lia amiko laboras en la fabriko "FSO". 4. Ŝia amiko loĝas en Toruń. 5. Nia najbaro ŝatas ludi ŝakon. 6. Ilia kolego loĝas en Pollando.

### II. Odpowiedzieć na pytania:

1. Ĉu vi volus havi propran skoteron? 2. Ĉu vi volus havi propran aŭtomobilon? 3. Ĉu vi volus havi propran magnetofonon? 4. Ĉu via frato /fratino/ havas propran gitaron? 5. Ĉu via kolego /kolegino/ havas propran buŝharmonikon? 6. Ĉu vi scipovas ludi gitaron? 7. Ĉu vi scipovas ludi buŝharmonikon? 8. Ĉu vi scipovas ludi pianon? 9. Ĉu vi scipovas danci tviston? 10. Ĉu via edzo scipovas danci tangon? 11. Ĉu via edzino scipovas danci valzon kaj fokstroton? 12. Ĉu vi scipovas konduki aŭtomobilon? 13. Ĉu vi ŝatas konduki skoteron? 14. Ĉu via amiko scipovas konduki skoteron? 15. Ĉu via avo scipovas konduki aŭtomobilon?

### III. Napisać pytania do następujących odpowiedzi:

1. Ĉu vi ______? Jes, mi scipovas. 2. Ĉu via

_____? Jes, li scipovas. 3. Ĉu via _____? Jes, ŝi scipovas. 4. Ĉu vi _____? Ne, mi ne scipovas danci tviston. 5. Ĉu via _____? Ne, li ne scipovas danci valson. 6. Ĉu via _____? Ne, ŝi ne scipovas ludi gitaron. 7. Ĉu vi _____? Jes, mi havas propran skoteron. 8. Ĉu via _____? Ne, li ne havas propran skoteron. 9. Ĉu via _____? Jes, ŝi havas propran skoteron.

IV. Wstawić brakujące wyrazy, które podano po polsku w nawiasie:

1. _____ /Mój/ patro ŝatas konduki aŭtomobilon. 2. _____ /Moja matka/ ne ŝatas konduki aŭtomobilon. 3. _____ /Twój brat/ ne scipovas ludi gitaron. 4. _____ /Jego kolega/ scipovas ludi pianon. 5. _____ /Jej przyjaciółka/ ne scipovas danci tviston. 6. _____ /Nasz sąsiad/ matene kaj vespere ludas pianon. 7. _____ /Wasz kuzyn/ sabate posttagmeze lernas fizikon. 8. _____ /Ich ciotka/ sabate vespere rigardas televidon.

## Lekcja 13

### 1. KIOM DA FRATOJ VI HAVAS?

a/ - Kiom da fratoj vi havas?
- Mi havas unu fraton.
- Mi havas du fratojn.
- Mi havas tri fratojn.

- Kiom da fratinoj vi havas?
- Mi havas unu fratinon.
- Mi havas du fratinojn.
- Mi havas tri fratinojn.

b/ - Kiom da jaroj havas via frato?
- Li havas kvar jarojn.
- Li havas kvin jarojn.
- Li havas ses jarojn.

- Kiom da jaroj havas via fratino?
- Ŝi havas sep jarojn.
- Ŝi havas ok jarojn.
- Ŝi havas naŭ jarojn.
- Ŝi havas dek jarojn.

c/ Tadeo: Ĉu vi havas gefratojn?
Karlo: Jes, mi havas.
Tadeo: Kiom da gefratoj vi havas?
Karlo: Mi havas kvar gefratojn - du fratojn kaj du fratinojn. Kaj vi? Ĉu vi havas gefratojn?
Tadeo: Jes, mi ankaŭ havas gefratojn. Mi havas unu fraton kaj kvin fratinojn.
Karlo: Ĉu vere?
Tadeo: Jes, vere.
Karlo: Kiom da jaroj havas via frato?
Tadeo: Mia frato? Li havas naŭ jarojn.

O b j a ś n i e n i a

Kiom da fratoj vi havas? Ilu masz braci?
Kiom da...? Ilu...? Ile...?
Kiom da jaroj...? Ile lat...?

W z ó r 1:

Kiom da jaroj havas via frato?

P r z y k ł a d y:

Kiom da jaroj havas via frato?
Ile lat ma twój brat?
Kiom da jaroj havas via fratino?
Ile lat ma twoja siostra?
Kiom da jaroj havas via kuzo?
Ile lat ma twój kuzyn?
Kiom da jaroj havas via kolego?
Ile lat ma twój kolega?
Kiom da jaroj havas via edzo?
Ile lat ma twój mąż?

W z ó r 2:

Li havas tri jarojn.

P r z y k ł a d y:

Li havas tri jarojn.
On ma trzy lata.
Li havas kvin jarojn.
On ma pięć lat.
Ŝi havas sep jarojn.
Ona ma siedem lat.
Ŝi havas dek jarojn.
Ona ma dziesięć lat.

2. KIOM DA DISKOJ VI HAVAS?

a/ - Kiom da diskoj vi havas?
- Mi havas dek unu diskojn.
- Mi havas dek du diskojn.
- Mi havas dek tri diskojn.
- Mi havas dek kvar diskojn.
- Mi havas dek kvin diskojn.

b/ - Kiom da sonbendoj vi havas?
- Mi havas dek ses sonbendojn.
- Mi havas dek sep sonbendojn.
- Mi havas dek ok sonbendojn.
- Mi havas dek naŭ sonbendojn.
- Mi havas dudek sonbendojn.

c/ - Kiom da libroj vi havas?
- Mi havas dudek unu librojn.
- Mi havas dudek du librojn.
- Mi havas dudek tri librojn.
- Mi havas tridek librojn.

- Kiom da bildkartoj vi havas?
- Mi havas dudek bildkartojn.
- Mi havas tridek bildkartojn.
- Mi havas kvardek bildkartojn.
- Mi havas kvindek bildkartojn.

- Kiom da poŝtmarkoj vi havas?
- Mi havas sesdek poŝtmarkojn.
- Mi havas sepdek poŝtmarkojn.
- Mi havas okdek poŝtmarkojn.
- Mi havas naŭdek poŝtmarkojn.

- Kiom da alumet-etikedoj vi havas?
  - Mi havas cent alumet-etikedojn.
  - Mi havas cent ok alumet-etikedojn.
  - Mi havas cent dek kvar alumet-etikedojn.
  - Mi havas cent dudek alumet-etikedojn.
  - Mi havas cent dudek du alumet-etikedojn.

ĉ/ Andreo: Kion vi kolektas?
Roberto: Mi kolektas poŝtmarkojn kaj bildkartojn.
Andreo: Kiom da poŝtmarkoj vi havas?
Roberto: Mi havas kvindek kvin poŝtmarkojn.
Andreo: Kaj kiom da bildkartoj vi havas?
Roberto: Mi havas cent okdek naŭ bildkartojn. Ĉu vi eble scias, kion kolektas Kristina?
Andreo: Kristina? Ŝi kolektas diskojn kun la kanzonoj de Paul Anka.
Roberto: Kiom da diskoj ŝi havas en sia kolekto?
Andreo: Ŝi havas en sia kolekto dek unu diskojn.
Roberto: Ĉu ŝia fratino ankaŭ kolektas diskojn?
Andreo: Ne, ŝia fratino ne kolektas diskojn. Ŝia fratino kolektas sonbendojn kun la kanzonoj de Beatlesoj.
Roberto: Kiom da sonbendoj ŝi havas en sia kolekto?
Andreo: Ŝi jam havas dek tri sonbendojn.

## O b j a ś n i e n i a

Kiom da diskoj...? Ile płyt...?
Mi havas dek unu diskojn. Mam jedenaście płyt. /patrz gram. "liczebniki główne"/
Kion vi kolektas? Co /ty/ zbierasz?
kun la kanzonoj de Paul Anka z piosenkami Paula Anki

Kiom da diskoj ŝi havas en sia kolekto? Ile płyt ona ma w swoim zbiorze?

W z ó r 3:

Kiom da diskoj ŝi havas?

P r z y k ł a d y:

Kiom da diskoj ŝi havas?
Ile ona ma płyt?
Kiom da poŝtmarkoj ŝi havas?
Ile ona ma znaczków?
Kiom da pupoj ŝi havas?
Ile ona ma lalek?

3. KION DONACIS AL VI VIA PATRO OKAZE DE LA NASKIĜTAGO?

a/ - Kion donacis al vi via patro okaze de la naskiĝtago?

- Li donacis al mi kasetan magnetofonon.
- Li donacis al mi manhorloĝon.
- Li donacis al mi diskon.
- Li donacis al mi sonbendon.

- Kion donacis al vi via patrino okaze de la nomtago?

- Ŝi donacis al mi novan gitaron.
- Ŝi donacis al mi novan manhorloĝon.
- Ŝi donacis al mi novan globkrajonon.
- Ŝi donacis al mi novan fontplumon.

b/ Anna: Kion donacis al vi via patro okaze de la nomtago?

Beata: Okaze de la nomtago? Okaze de la nomtago li donacis al mi diskon kun la kanzonoj de "Partita".

Anna: Kaj kion donacis al vi la patrino?

Beata: Ŝi donacis al mi fontplumon kaj globkrajonon. Ĉu vi scias, kion donacis al mi mia avo?

Anna: Ne. Mi ne scias.

Beata: Li donacis al mi poŝtmark-albumon.
Anna: Poŝtmark-albumon? Ĉu vi kolektas poŝtmarkojn?
Beata: Jes, mi kolektas. Mi kolektas poŝtmarkojn kaj fotografaĵojn de famaj aktoroj.
Anna: Kiom da poŝtmarkoj vi jam havas?
Beata: Mi jam havas cent okdek poŝtmarkojn kaj kvindek sep fotografaĵojn de famaj aktoroj.

O b j a ś n i e n i a

Kion donacis al vi...? Co ci podarował...?
okaze de la naskiĝtago z okazji urodzin /naskiĝtago urodziny, dzień urodzin/
okaze de la nomtago z okazji imienin

W z ó r 4:
Li donacis al mi manhorloĝon.

P r z y k ł a d y:

Li donacis al mi manhorloĝon.
On podarował mi zegarek na rękę.
Li donacis al mi globkrajonon.
On podarował mi długopis.
Li donacis al mi krajonon.
On podarował mi ołówek.
Li donacis al mi fontplumon.
On podarował mi pióro wieczne.
Li donacis al mi plumon.
On podarował mi pióro.

4. KIOMA HORO NUN ESTAS?

a/ - Kioma horo nun estas?
- Nun estas la 1-a /unua/.
- Nun estas la 2-a /dua/.
- Nun estas la 3-a /tria/.
- Nun estas la 4-a /kvara/.
- Nun estas la 5-a /kvina/.

b/ - Kioma horo?

- Nun estas la 6-a /sesa/.
- Nun estas la 7-a /sepa/.
- Nun estas la 8-a /oka/.
- Nun estas la 9-a /naŭa/.
- Nun estas la 10-a /deka/.

c/ - Pardonu, sinjoro, kioma horo nun estas?

- Nun estas la 11-a /dek-unua/.
- Nun estas la 12-a /dek-dua/.
- Nun estas la 13-a /dek-tria/.
- Nun estas la 14-a /dek-kvara/.

ĉ/ Pardonu, sinjorino, kioma horo nun estas?

- Nun estas la 15-a /dekkvina/.
- Nun estas la 16-a /deksesa/.
- Nun estas la 17-a /deksepa/.
- Nun estas la 18-a /dekoka/.

d/ Ĉu vi povas diri al mi, kioma horo nun estas?

- Jes, volonte.
- Nun estas la 19-a /deknaŭa/.
- Nun estas la 20-a /dudeka/.
- Nun estas la 21-a /dudekunua/.
- Nun estas la 22-a /dudekdua/.
- Nun estas la 23-a /dudektria/.
- Nun estas la 24-a /dudekkvara/.

e/ Helena: Banjo, kioma horo nun estas?
Barbara: Bedaŭrinde mi ne scias, mi ne havas horloĝon.
Helena: Pardonu, sinjorino, ĉu vi povas diri al mi, kioma horo nun estas?
Sinjorino M.: Jes, volonte. Nun estas la 16-a /deksesa/.
Helena: Mi dankas al vi, sinjorino!
Sinjorino M.: Ne dankinde!

f/ - Kioma horo nun estas?

- Duono antaŭ la 5-a /kvina/.
- Duono post la 4-a /kvara/.
- Kvarono antaŭ la 6-a /sesa/.

- Kvarono post la 6-a /sesa/.
- 5 minutoj antaŭ la 3-a /tria/.
- 10 minutoj post la 7-a /sepa/.
- 35 minutoj post la 9-a /naŭa/.
- La 8-a /oka/ kaj duono.
- La 10-a /deka/ kaj kvarono.

g/ Teresa: Pardonu, kioma horo?
Ursula: 10 minutoj post la 3-a /tria/.
Teresa: Ĉu via horloĝo bone funkcias?
Ursula: Ĝi bone funkcias. Sed, kial vi demandas? Kioma horo estas laŭ via horloĝo?
Teresa: Laŭ mia horloĝo nun estas precize la 3-a /tria/.
Ursula: Via horloĝo rapidas.
Teresa: Mia horloĝo bone funkcias, sed via horloĝo malbone funkcias. Ĝi malfruas.
Ursula: Malfruas? Ne! Pardonu, sinjoro, kioma horo nun estas?
Sinjoro W.: Nun estas du minutoj post la 3-a /tria/.

## Objaśnienia

Kioma? Który z kolei? /Która z kolei?/
Kioma horo? Która godzina?
la 1-a /unua/ pierwsza /patrz gram. "liczebniki porządkowe"/
pardonu! przepraszam! /dosł. "wybacz! wybaczcie!", "proszę mi wybaczyć!"/
Jes, volonte. Tak, chętnie.
Ĉu via horloĝo bone funkcias? Czy twój zegarek dobrze chodzi? /dosł. Czy twój zegarek dobrze funkcjonuje?/
laŭ via horloĝo na twoim zegarku /dosł. według twojego zegarka/
malfrui późnić się /o zegarku/
rapidi spieszyć się /o zegarku, człowieku/

5. BELA DONACO

Hodiaŭ estas la naskiĝtago de Roberto. Matene la gepatroj de Roberto kaj liaj gefratoj Barbara kaj Karlo bondeziras al li. La knabo estas tre feliĉa, ĉar la gepatroj donacis al li belan manhorloĝon. La horloĝo estas tre bela kaj ĝi tre plaĉas al la knabo. Ankaŭ Barbara kaj Karlo estas feliĉaj. Kun kontento ili rigardas ĉi tiun belan manhorloĝon.

- Kioma horo nun estas laŭ via horloĝo? - demandas scivole Barbara.

- Nun estas la 6-a /sesa/. - respondas fiere la knabo.

- La 6-a? - miras la patro. - Via horloĝo ankoraŭ ne funkcias.

- Jes, vere, ĝi ankoraŭ ne funkcias! - diras la patrino.

- Nun estas la 7-a /sepa/. - diras la patro. - Vi nun devas streĉi vian horloĝon, sed ĉu vi scipovas streĉi horloĝon?

- Mi jam havas 13 jarojn. - diras Roberto. - Mi scipovas streĉi horloĝon!

- Bone. - diras la patro. Do, streĉu vian horloĝon! Nun estas precize unu minuto antaŭ la 7-a /sepa/.

- Panjo, - diras Karlo - via horloĝo malfruas! Laŭ mia horloĝo nun estas 2 minutoj post la 7-a /sepa/.

- Karlo, Karlo, via horloĝo rapidas. - diras la patrino. - Antaŭ kelkaj minutoj mi aŭskultis radion kaj mi aŭdis la precizan tempon. Laŭ la radia tempo nun estas la 7-a /sepa/.

O b j a ś n i e n i a

Barbara kaj Karlo bondeziras al li Barbara i Karol składają mu życzenia /dosł. bondeziras al li dobrze mu życzą; bona dobry; deziri życzyć coś komuś/

kun kontento z zadowoleniem

scivole z zaciekawieniem, z ciekawością / = kun scivolo/
fiere dumnie / = kun fiero/
streĉi horloĝon nakręcić zegarek /dosł. napiąć zegarek/
antaŭ kelkaj minutoj przed kilkoma minutami /kelkaj kilka/
laŭ la radia tempo według /podług/ czasu radiowego /tempo czas/

### S ł o w n i c z e k

antaŭ przed; bondeziri składać życzenia; disko płyta /gramofonowa/; donaci /po/darować; feliĉa szczęśliwy; fiera dumny; fontplumo pióro wieczne; funkcii funkcjonować, działać; globkrajono długopis; horo godzina; horloĝo zegarek; kanzono piosenka; kaseto kaseta; kaseta kasetowy /np. magnetofon/; kiom da? ile /kogo, czego/?; kioma? który /z kolei/?; krajono ołówek; laŭ według, podług; malfrui późnić się; mano ręka; manhorloĝo zegarek na rękę; minuto minuta; naskiĝtago urodziny, dzień urodzin; nomtago imieniny, dzień imienia /= nomfesto/; okaze de z okazji; pardoni wybaczać, przebaczać; plumo pióro; post po; poŝtmark-albumo klaser, album /do znaczków/; precize dokładnie, precyzyjnie; radia radiowy; rapidi spieszyć się; scivola ciekawy /czegoś/, zaciekawiony /czymś/; sonbendo taśma magnetofonowa; tempo czas; volonte chętnie

## G R A M A T Y K A

### Liczebniki główne

Liczebniki główne /proste/ mają następujące formy:

| | | | |
|---|---|---|---|
| nul/o/ | - 0 | ses | - 6 |
| unu | - 1 | sep | - 7 |
| du | - 2 | ok | - 8 |
| tri | - 3 | naŭ | - 9 |
| kvar | - 4 | dek | -10 |
| kvin | - 5 | | |

Liczebniki główne złożone mają budowę zbliżoną do analogicznych liczebników polskich:

| | | | |
|---|---|---|---|
| dudek | - 20 | sesdek | - 60 |
| tridek | - 30 | sepdek | - 70 |
| kvardek | - 40 | okdek | - 80 |
| kvindek | - 50 | naŭdek | - 90 |

Jak widzimy, podstawą liczebników złożonych są liczebniki proste, które wskazują liczbę dziesiątek. Te same liczebniki proste w połączeniu z cent /sto/ wskazują liczbę setek:

| | | | |
|---|---|---|---|
| ducent | - 200 | sescent | - 600 |
| tricent | - 300 | sepcent | - 700 |
| kvarcent | - 400 | okcent | - 800 |
| kvincent | - 500 | naŭcent | - 900 |

Inne liczebniki główne:

mil/o/ - 1 000
miliono - 1 000 000
miliardo - 1 000 000 000

Jedności piszemy zawsze oddzielnie:

dek unu - 11
dek kvin - 15
dudek sep - 27
cent dek naŭ - 119

## Liczebniki porządkowe

Liczebniki porządkowe tworzy się przez dodanie końcówki -a do liczebnika głównego, np.:

unu + a = unua - pierwszy, pierwsza, pierwsze
du + a = dua - drugi, druga, drugie
tri + a = tria - trzeci, trzecia, trzecie
dek + a = deka - dziesiąty, dziesiąta, dziesiąte

W podobny sposób tworzy się pozostałe liczebniki porządkowe. Oto kilka z nich:

dekunua - jedenasty
dudeka - dwudziesty
trideksepa - trzydziesty siódmy

mila - tysięczny
miliona - milionowy itp.

Uwaga! W liczebnikach porządkowych złożonych poszczególne elementy bardzo często oddzielamy za pomocą kreseczki:
dek-dua - dwunasty
cent-kvardek-naŭa - sto czterdziesty dziewiąty itp.

## Przysłówki pochodne

Przysłówki pochodne tworzy się od innych części mowy za pomocą końcówki -e, np.:

bona - dobry — bone - dobrze
fiera - dumny — fiere - dumnie
scivola - zaciekawiony, ciekaw /czegoś/ — scivole - z ciekawością, z zaciekawieniem
malbona - zły — malbone - źle

## Ć W I C Z E N I A

I. Napisać słowami:

1/ 12, 16, 19, 23, 34, 45, 56, 67, 78, 89, 92, 100;
2/ 102, 109, 117, 189, 233, 457, 677, 888, 999, 1 000;
3/ 1 002, 1 062, 1 099, 2 344, 10 001, 888 777, 1 000 003.

II. Napisać cyframi:

1/ ducent dek sep, ducent kvardek naŭ, tricent sepdek ok;
2/ okcent naŭdek naŭ, naŭcent unu, naŭcent dek tri;
3/ mil unu, mil dek ses, mil kvardek kvar, mil cent naŭ;
4/ mil ducent kvardek ok, mil kvincent sepdek sep;
5/ mil naŭcent sesdek ses, mil naŭcent sesdek sep.

III. Nastepujace daty związane z historia Polski napisać słowami:

966, 1025, 1138, 1364, 1410, 1444, 1466, 1596, 1620

IV. Odpowiedzieć na pytania:

1. Kiom da jaroj vi havas? 2. Kiom da jaroj havas via patro? 3. Kiom da jaroj havas via patrino? 4. Kiom da jaroj havas via frato /fratino/?

V. Uzupełnić wyrazami podanymi po polsku w nawiasie:

1. ______ /Która/ horo nun estas? 2. Kioma ______ /godzina/ nun estas, sinjoro? 3. ______ /Przepraszam pana/, kioma horo? 4. Nun estas la ______ /szesnasta/. 5. Nun estas la ______ /dwudziesta/. 6. ______ /Teraz/ estas la ______ /dwudziesta trzecia/. 7. Nun estas 10 ______ /minut/ post la ______ /trzecia/. 8. Estas ______ /trzynaście/ minutoj kaj ______ /dziesięć/ sekundoj ______ /po/ la oka. 9. Estas ______ /trzy/ minutoj ______ /przed/ la deka.

Lekcja 14

1. JE KIOMA HORO?

a/ Barbara: Mi volus renkontiĝi kun vi.
Teresa: Je kioma horo?
Barbara: Je la 3-a /tria/ posttagmeze.
Teresa: Je la 3-a posttagmeze? Bone. Ĉu vi estas akurata?
Barbara: Mi estas tre akurata. Kaj vi, Terenjo?
Teresa: De tempo al tempo.

b/ Johano: Ĉu vi estas akurata?
Petro: Ĉiam. Sed kial vi demandas pri tio?

Johano: Tial, ke mi volus renkontiĝi kun vi.
Petro: Vi volus renkontiĝi kun mi? Kiam?
Johano: Hodiaŭ vespere.
Petro: Je kioma horo?
Johano: Je la 7-a /sepa/ vespere.
Petro: Kiucele vi volus renkontiĝi kun mi?
Johano: Mi volus kune kun vi lerni matematikon.
Petro: Bone.

c/ - Ĉu vi estas libera hodiaŭ je la 16-a /deksesa/?
- Ĉu vi estas libera hodiaŭ je la 17-a /deksepa/?
- Ĉu vi estas libera hodiaŭ je la 18-a /dekoka/?
- Ĉu vi estas libera hodiaŭ je la 20-a /dudeka/?

- Jes, mi estas libera.
- Ne, mi ne estas libera. Mi estas okupita.

ĉ/ - Mi volus renkontiĝi kun vi je la 3-a /tria/ posttagmeze.
- Mi volus renkontiĝi kun vi je la 4-a /kvara/ posttagmeze.
- Mi volus renkontiĝi kun vi je la 7-a//sepa/ vespere.
- Mi volus renkontiĝi kun vi je la 8-a /oka/ vespere.

- Bone.

d/ - Je kioma horo vi matenmanĝas?

- Mi matenmanĝas je la 6-a /sesa/.
- Mi matenmanĝas je la 9-a /naŭa/.

- Je kioma horo vi tagmanĝas?

- Mi tagmanĝas je la 3-a /tria/.
- Mi tagmanĝas je la 4-a /kvara/.

- Je kioma horo vi vespermanĝas?

- Mi vespermanĝas je la 8-a /oka/.
- Mi vespermanĝas je la 10-a /deka/.

O b j a ś n i e n i a

Je kioma horo? O której godzinie?
je la 3-a /tria/ o trzeciej
de tempo al tempo od czasu do czasu

W z ó r 1:

Je kioma horo vi matenmanĝas?

P r z y k ł a d y:

Je kioma horo vi matenmanĝas?
O której godzinie jesz śniadanie?
Je kioma horo vi tagmanĝas?
O której godzinie jesz obiad?
Je kioma horo vi vespermanĝas?
O której godzinie jesz kolację?

2. MI ENLITIĜAS DUONHORON ANTAŬ LA SEPA

a/ - Je kioma horo vi enlitiĝas?
- Mi enlitiĝas duonhoron antaŭ la sepa.
- Je kioma horo vi enlitiĝas?
- Mi enlitiĝas kvaronhoron antaŭ la oka.
- Je kioma horo vi enlitiĝas?
- Mi enlitiĝas kvaronhoron post la sesa.
- Je kioma horo vi enlitiĝas?
- Mi enlitiĝas duonhoron antaŭ la 21-a.
- Je kioma horo vi enlitiĝas?
- Mi enlitiĝas 10 minutojn antaŭ la 22-a.
- Mi enlitiĝas 15 minutojn antaŭ la 23-a.
Je kioma horo vi enlitiĝas?
- Mi enlitiĝas 10 minutojn post la 22-a.

- Mi enlitiĝas 15 minutojn post la 23-a.

b/ Halina: Je kioma horo vi ellitiĝas?
Kristina: Duonhoron antaŭ la sepa. Kaj vi?
Halina: Mi ellitiĝas kvaronhoron antaŭ la sepa.
Kristina: Je kioma horo vi matenmanĝas?
Halina: Mi matenmanĝas 20 minutojn antaŭ la sepa. Kaj vi?
Kristina: Mi? Mi matenmanĝas 5 minutojn post la sepa.

c/ Sofia: Je kioma horo vi enlitiĝas?
Renata: Mi enlitiĝas 5 minutojn post la noktomezo.
Sofia: Post la noktomezo? Tiel malfrue?
Renata: Malfrue? Jes, eble. Sed mi devas multe lerni. Mi ofte lernas ĝis noktomezo kaj pro tio mi tre ofte enlitiĝas 5 aŭ 10 minutojn post la noktomezo.
Sofia: Ĉu vi devas frue ellitiĝi?
Renata: Frue? Jes, sufiĉe frue. Mi ellitiĝas 10-15 /dek-dek kvin/ minutojn post la 7-a /sepa/.

O b j a ś n i e n i a

mi ellitiĝas wstaję z łóżka /ellitiĝi wstać z łóżka/
duonhoron patrz gram. "punkt w czasie"
post la noktomezo po północy /noktomeze o północy/
tiel frue tak wcześnie; tiel malfrue tak późno
multe lerni dużo uczyć się
ĝis la noktomezo /aż/ do północy

W z ó r 2:

Mi ellitiĝas duonhoron antaŭ la sepa.

P r z y k ł a d y:

Mi ellitiĝas duonhoron antaŭ la sepa.

Wstaję z łóżka o wpół do siódmej.
Mi ellitiĝas kvaronhoron antaŭ la sesa.
Wstaję z łóżka kwadrans przed szóstą.
Mi ellitiĝas 10 minutojn antaŭ la sepa.
Wstaję z łóżka dziesięć minut przed siódmą.

3. DE KIOMA ĜIS KIOMA HORO VI LERNAS?

a/ De kioma ĝis kioma horo vi lernas?
De kioma ĝis kioma horo vi laboras?
De kioma ĝis kioma horo vi dormas?
De kioma ĝis kioma horo vi legas libron?
De kioma ĝis kioma horo vi rigardas televidon?
- De la 15-a ĝis la 19-a.
- De la 8-a ĝis la 16-a.
- De la 22-a ĝis la 7-a.
- De la 19-a ĝis la 21-a.

b/ Katarina: Bonan tagon!
Margareta: Bonan tagon!
Katarina: Ĉu vi povas veni al mi hodiaŭ vespere?
Margareta: Je kioma horo?
Katarina: Mi ne scias, je kioma horo vi havas tempon. Ĉu vi havas tempon je la 7-a /sepa/?
Margareta: Jes, je la 7-a mi estas libera.
Katarina: Vi scias, mi volus kune kun vi lerni fizikon.
Margareta: Bone, sed mi havas tempon nur ĝis la 8-a!
Katarina: Ĝis la 8-a? Do, bone. Ni povas lerni fizikon de la 7-a ĝis la 8-a.
Margareta: Ho, pardonu, mi forgesis... ĉe kiu strato vi loĝas?
Katarina: Mi loĝas ĉe la strato Radomska 33 loĝejo 47.
Margareta: Sur kioma etaĝo vi loĝas?
Katarina: Mi loĝas sur la kvara etaĝo.
Margareta: Ĉu en via domo estas lifto?
Katarina: Lifto? Jes, estas lifto. Ĉu vi havas

ŝlosilon por lifto?

Margareta: Jes, mi havas. Do, ĝis la!

Katarina: Ĝis la! Estu akurata!

Margareta: Mi ĉiam estas akurata!

O b j a ś n i e n i a

de kioma ĝis kioma...? od której do której...?

Je kioma horo vi havas tempon? O której godzinie masz czas?

nur ĝis la 8-a tylko do ósmej

mi forgesis zapomniałem /forgesi zapominać/

Sur kioma etaĝo...? Na którym piętrze...?

Estu akurata! Bądź punktualny! Bądź punktualna!

W z ó r 3:

Ĉu vi havas tempon je la 7-a?

P r z y k ł a d y:

Ĉu vi havas tempon je la 7-a?
Czy masz czas o siódmej?
Ĉu vi havas tempon je la 9-a?
Czy masz czas o dziewiątej?
Ĉu vi havas tempon je la 10-a?
Czy masz czas o dziesiątej?

## 4. EN LERNEJO

Roberto troviĝas nun en sia lernejo. Estas 15 /dek kvin/ minutoj antaŭ la 8-a /oka/. Liaj gekolegoj bondeziras al li okaze de la naskiĝtago.

- Kion donacis al vi viaj gepatroj okaze de la naskiĝtago? - demandas Roberton la gekolegoj.

- Mi ricevis belan manhorloĝon. Jen ĝi! - diras Roberto kaj fiere montras sian manhorloĝon al la gekolegoj.

Liaj gekolegoj rigardas la horloĝon kun scivolo kaj admiro.

- Kiel moderna, kiel bela estas via horloĝo! - diras la gekolegoj.

Estas precize la 8-a /oka/ horo matene. Ĝuste

venas la instruisto de la klaso de Roberto, sinjoro Roland.

- Bonan tagon, sinjoro instruisto! - diras la gelernantoj.

- Bonan tagon, geknaboj! Kio okazis? Kial en la klasoĉambro ankoraŭ ne estas ordo? Jam estas la 8-a! Kial vi, Manjo, ne troviĝas en la benko?

- Sinjoro instruisto, hodiaŭ estas la naskiĝtago de Roberto. Li ricevis belan manhorloĝon kun kalendaro! Ni rigardis la horloĝon kaj...

- Kaj? Hmm... nu, mi pardonas al vi! Roberto!

- Jes?

- Okaze de la naskiĝtago mi deziras al vi multajn sukcesojn en la vivo!

- Dankon, sinjoro instruisto!

- Kiom da jaroj vi jam havas?

- Nun mi havas 14 jarojn.

- Kaj nun montru al mi vian manhorloĝon! Ho, jes, vere, ĝi estas tre bela. Diru al mi, kioma horo nun estas!

- Nun estas 5 /kvin/ minutoj post la 8-a /oka/.

- Ho, jam estas malfrue. Karaj gelernantoj, nun estas leciono de matematiko!

### O b j a ś n i e n i a

<u>klaso</u> klasa /w znaczeniu: uczennice i uczniowie/
<u>klasoĉambro</u> klasa, sala lekcyjna /klaso+ĉambro/
<u>Mi pardonas al vi!</u> Wybaczam ci!
<u>leciono de matematiko</u> lekcja matematyki
<u>Uwaga!</u> Zamiast przyimka <u>de</u> użyć można przyimka <u>pri</u>:
leciono <u>pri</u> matematiko - lekcja matematyki
leciono <u>pri</u> historio - lekcja historii
leciono <u>pri</u> geografio - lekcja geografii

## 5. SPRITAĴOJ

a/

Pasas du horoj, pasas tri horoj, pasas kvar horoj. La preleganto parolas, parolas kaj parolas.

En la salono multaj homoj jam dormas. Sed jen iu sinjorino diras al la preleganto:

- Mi petas pardonon, sinjoro preleganto, mi volus demandi vin.

- Jes, bonvolu!

- Mi volus vin demandi, sinjoro, ĉu tio, kion vi havas sur la mano estas horloĝo aŭ kalendaro?

b/

Sinjoro Tomaso ricevis novan laboron. Lia amiko, Henriko, demandas lin:

- Kiel plaĉas al vi, Tomĉjo, via nova laboro?
- Ne tre.
- Kial?
- La ĉefo ordonas labori por du.
- Ĉu vere?
- Jes, vere. Feliĉe ni estas kvar.

O b j a ś n i e n i a

pasas du horoj  mijają dwie godziny /pasi mijać, upływać/
mi petas pardonon  przepraszam proszę /mi/ wybaczyć
bonvolu  proszę, bardzo proszę
ne tre  nie bardzo /tre bardzo/
labori por du  tu: pracować za dwóch
feliĉe  na szczęście /feliĉo szczęście; feliĉa szczęśliwy/

6. LETERO

Kara Amiko!

Mi ricevis vian leteron hodiaŭ posttagmeze kaj mi decidis tuj respondi al vi. Mi estas tre kontenta, ke vi deziras korespondi kun mi. Mi tre ĝojas, ĉar mi ankoraŭ ne havas korespondanton en Pollando.

Mi loĝas kune kun miaj gepatroj kaj gefratoj en la bela hungara urbo Szeged. Mi havas 15 jarojn kaj mi lernas en la dua klaso de teknikumo. Mi tre ĝojas, ke vi interesiĝas pri filatelo, ĉar mi

ankaŭ interesiĝas pri ĝi. Mi kolektas poŝtmarkojn pri la temo "turismo" kaj kovertojn kun porokazaj stampoj. Mi ankaŭ kolektas turismajn prospektojn kaj pro tio mi ankaŭ volus interŝanĝi kun vi turismajn prospektojn. Mi havas gefratojn - du fratojn kaj unu fratinon. Mia fratino interesiĝas pri geografio kaj ŝi kolektas bildkartojn. Ĉu vi povas sendi al mia fratino bildkartojn pri Varsovio, Gdansko, Vroclavo kaj Krakovo? Mia fratino povas sendi al vi bildkartojn pri Budapeŝto, Balatono kaj Szeged.

Skribu al mi, en kioma klaso vi lernas kaj ĉu vi deziras interŝanĝi bildkartojn kun mia fratino.

Kore salutas vin

Tibor

Mia adreso:...

## O b j a ś n i e n i a

mi tre ĝojas bardzo się cieszę /ĝoji cieszyć się/
Szeged miasto na południu Węgier /wymawiaj: "Seged"/
pri la temo "turismo" na temat /o temacie/ "turystyka"
porokazaj stampoj stemple okolicznościowe /porokaza okolicznościowy/
En kioma klaso vi lernas? W której klasie się uczysz?
kore salutas vin serdecznie pozdrawia cię

## S ł o w n i c z e k

admiri podziwiać; akurata akuratny, punktualny; benko ławka; bonvoli zechcieć, raczyć; ĉiam zawsze; ellitiĝi wstać z łóżka; enlitiĝi położyć się do łóżka; etaĝo piętro; forgesi zapominać, zapomnieć; frue wcześnie; ĝis do, aż do; ĝoji cieszyć się, radować się; iu ktoś, jakiś, jakaś; je patrz gram. "punkt w czasie"; kalendaro kalendarz; klaso klasa /w znaczeniu: uczennice i uczniowie/; klasoĉan-

bro klasa, sala lekcyjna; kore serdecznie; koro serce; koverto koperta; leciono lekcja; lifto winda; matenmanĝi jeść śniadanie; multe dużo, wiele; noktomezo północ; ordo porządek; ordoni rozkazać, wydać rozkaz; pasi mijać; porokaza okolicznościowy; preleganto prelegent; pro tio z tego powodu, dlatego; ricevi otrzymać; salono sala; saluti pozdrowić; sendi posłać; spritaĵo dowcip, żart /potocznie: kawał/; stampo stempel, odbitka; sufiĉe dostatecznie, wystarczająco; sukceso sukces, powodzenie; ŝlosilo klucz; tagmanĝi jeść obiad; tuj zaraz, natychmiast; veni przybyć, przyjść; vespermanĝi jeść kolację

## GRAMATYKA

### Punkt w czasie

Punkt w czasie określa przyimek je:

Je kioma horo? O której godzinie?

Je la 7-a /sepa/. O siódmej.

Do tego samego celu służy również biernik. Biernik określa punkt w czasie, w którym rozpoczyna się jakaś czynność, np.:

Je kioma horo vi ellitiĝas?
O której godzinie wstajesz z łóżka?
Duonhoron antaŭ la 7-a.
O wpół do siódmej.
Kvaronhoron antaŭ la 7-a.
Kwadrans przed siódmą.
10 minutojn antaŭ la 7-a.
Dziesięć minut przed siódmą.
20 minutojn post la 6-a.
Dwiadzieścia minut po szóstej.

Uwaga! Przyimek je nie ma ściśle określonego znaczenia, które pokrywałoby się z tym, czy innym przyimkiem polskim. Poznane znaczenie "je" w sensie "o" występuje tylko w kontekście "o której godzinie".

## ĆWICZENIA

I. Uzupełnić odpowiedzi:

W z ó r:

Sinjoro Tadeo ellitiĝas duonhoron antaŭ la 7-a
Je kioma horo ellitiĝas sinjoro Tadeo? Li...
Li ellitiĝas duonhoron antaŭ la 7-a.

1. Sinjoro Andreo ellitiĝas kvaronhoron post la 6-a. Je kioma horo ellitiĝas sinjoro Andreo? Li...
2. Sinjoro Konrado enlitiĝas duonhoron post la 8-a. Je kioma horo enlitiĝas sinjoro Konrado? Li...
3. Sinjorino Barbara matenmanĝas 15 minutojn post la 8-a. Je kioma horo matenmanĝas sinjorino Barbara? Ŝi...
4. Sinjorino Eva tagmanĝas 15 minutojn antaŭ la 4-a. Je kioma horo tagmanĝas sinjorino Eva? Ŝi...
5. Roberto vespermanĝas 10 minutojn post la 20-a. Je kioma horo vespermanĝas Roberto? Li...

II. Odpowiedzieć na pytania:

1. Ĉu vi estas libera hodiaŭ posttagmeze je la 5-a? 2. Ĉu vi estas libera hodiaŭ vespere je la 9-a? 3. Ĉu vi estas akurata? 4. Ĉu via frato /fratino/ estas akurata? 5. En kioma klaso vi lernas? 6. En kioma klaso lernas via frato /fratino/? 7. Sur kioma etaĝo vi loĝas? 8. Sur kioma etaĝo loĝas via amiko /amikino/? 9. De kioma ĝis kioma horo vi lernas? 10. De kioma ĝis kioma horo laboras via patro /patrino/?

III. Uzupełnić wyrazami podanymi po polsku w nawiasie:

1. ______ /Na którym/ etaĝo vi loĝas? Mi lo-

ĝas sur la ______ /piątym/ etaĝo. Kaj vi? Mi loĝas sur la partero kaj mia onklo ______ /na szóstym piętrze/.

2. ______ /W której/ klaso vi lernas? Mi lernas en la ______ /dziesiątej/ klaso. Kaj vi? Mi lernas en la ______ /dziewiątej klasie/.

3. ______ /Od której/ ĝis kioma ______ /godziny/ vi laboras? Mi laboras ______ /od szóstej rano/ ĝis la ______ /czwartej po południu/.

## Lekcja 15
/la dek-kvina leciono/

### 1. KIO ESTAS HODIAŬ POR TAGMANĜO?

a/ - Kio estas hodiaŭ por tagmanĝo?
- Hodiaŭ estas buljono.
- Hodiaŭ estas tomata supo.
- Hodiaŭ estas kukuma supo.
- Hodiaŭ estas frukta supo.
- Hodiaŭ estas legoma supo.
- Hodiaŭ estas funga supo.

b/ - Panjo, kio estas hodiaŭ por tagmanĝo?
- Hodiaŭ estas bovaĵo kun terpomoj.
- Hodiaŭ estas porkaĵo kun farunbuloj.
- Hodiaŭ estas kokaĵo kun terpomoj.
- Hodiaŭ estas kokinaĵo kun makaronioj.
- Hodiaŭ estas ovaĵo kun makaronioj.

c/ Renata: Je kioma horo vi tagmanĝis hodiaŭ?
Irena: Duonhoron antaŭ la 4-a.
Renata: Kion vi tagmanĝis?
Irena: Mi tagmanĝis bovaĵon kun rizo. Kaj vi?
Renata: Mi tagmanĝis kotleton kun farunbuloj kaj legomoj.
Irena: Ĉu ĝi estis bongusta?

Renata: Jes, ĝi estis bongusta.
Irena: Kaj kion vi tagmanĝis, Banjo?
Barbara: Mi tagmanĝis ovaĵon kun makaronioj.
Irena: Ĉu tiu ĉi manĝaĵo estis bongusta?
Barbara: Jes, tiu ĉi manĝaĵo estis bongusta.
Irena: Kaj kion vi manĝis por la unua plado?
Barbara: Por la unua plado? Por la unua plado mi manĝis buljonon kun makaronioj.
Irena: Kaj kio estis por deserto?
Barbara: Por deserto estis kompoto.

O b j a ś n i e n i a

por tagmanĝo na obiad
bovaĵo wołowina; /bovo wół/ patrz gram. "przyrostek -aĵ"
Kion vi tagmanĝis? Co jadłeś /jadłaś/ na obiad?
tagmanĝo obiad
por la unua plado na pierwsze danie; plado półmisek, tu: danie

W z ó r 1:

Kio estas por tagmanĝo?

P r z y k ł a d y:

Kio estas por tagmanĝo?
Co jest na obiad?
Kio estas por matenmanĝo?
Co jest na śniadanie?
Kio estas por vespermanĝo?
Co jest na kolację?
Kio estas por deserto?
Co jest na deser?
Kio estas por la unua plado?
Co jest na pierwsze danie?
Kio estas por la dua plado?
Co jest na drugie danie?

2. DONU AL MI LA SALUJON!

a/ - Ĉu vi deziras salon?
- Ĉu vi deziras sukeron?

- Ĉu vi deziras pipron?
- Ĉu vi deziras paprikon?
- Ĉu vi deziras mustardon?
  - Jes, mi petas.
  - Ne, dankon!

b/ - Donu al mi la salujon!
- Donu al mi la sukerujon!
- Donu al mi la piprujon!
- Donu al mi la paprikujon!
- Donu al mi la mustardujon!
  - Bonvolu, sinjoro /sinjorino/!

c/ Maria: Ĉu ĉio jam estas preta por tagmanĝo?
Teresa: Jes. Tranĉiloj, forkoj kaj kuleroj jam estas sur la tablo.
Maria: Ĉi tiun tason kaj ĉi tiun subtason metu apud la telero!
Teresa: Bone.
Maria: Kaj kie estas salujo kaj piprujo?
Teresa: Jen ili estas ĉi tie!
Maria: Kaj la cindrujo? La cindrujon vi povas meti ĉi tie, en la mezo.

O b j a ś n i e n i a

Donu al mi la salujon! Podaj mi solniczkę! /patrz gram. "przyrostek -uj"/
Ĉu ĉio jam estas preta...? Czy wszystko już gotowe...?
metu połóż /meti kłaść/
en la mezo /= meze/ w środku

3. TAGMANĜO KUN SINJORO SEMEK

a/

Hodiaŭ la gepatroj de Roberto invitis por tagmanĝo sinjoron Semek. Sinjoro Semek estas amiko de la familio de Roberto kaj li ofte vizitas la gepatrojn.
La patrino: Kioma horo nun estas?
Roberto: Estas kvarono antaŭ la 3-a.
La patrino: Do, sinjoro Semek jam devus esti

ĉi tie!

La patro: Via horloĝo, Robĉjo, verŝajne malbone funkcias! Laŭ mia manhorloĝo kaj laŭ la vekhorloĝo, kiu staras sur la tablo estas nun 5 minutoj antaŭ la 3-a.

Roberto: Paĉjo, ĉu via manhorloĝo bone funkcias? Ĉu ĝi ne rapidas?

La patro: Antaŭ du horoj mi streĉis mian manhorloĝon kaj mi kontrolis ĝin laŭ la radia tempo. Mi konstatis, ke mia manhorloĝo precize montras la tempon. Do, certe via horloĝo malfruas!

La patrino: Sinjoro Semek jam devus esti ĉi tie. Mi ne komprenas kial li ankoraŭ ne venis. Li estas tiel akurata.

b/

La patro: Ho, li jam venis.

La patrino: Robĉjo, malfermu la pordon!

Sinjoro S.: Bonan tagon!

La gepatroj: Bonan tagon! Bonan tagon!

Roberto: Bonan tagon, sinjoro!

Sinjoro S.: /rigardas sian manhorloĝon/ Nu, estas la 3-a. Mi estas akurata. /al la gepatroj de Roberto/ Kiel vi fartas, miaj karaj?

La patrino: Dankon, bone.

La patro: Tute bone.

La patrino: La tagmanĝo jam estas preta.

La patro: Vi certe malsatas, ĉu ne?

Sinjoro S.: Ho, nur iomete.

La patrino: Por la unua plado estas tomata supo kaj por la dua plado estas bovaĵo kun terpomoj kaj legomoj. Por la deserto estas kompoto kaj kukoj.

c/

Sinjoro S.: La supo estas tre bongusta. Vi tre bone kuiras, sinjorino!

La patrino: Mi dankas, vi estas tre afabla, sinjoro!

La patro: Ĉu vi deziras salon, sinjoro?
Sinjoro S.: Iomete.
La patro: Robĉjo, donu al nia gasto la salujon!
Sinjoro S.: Mi dankas!
Roberto: Panjo, ĉu vi povas doni al mi la piprujon?
La patrino: Bonvolu, jen estas la piprujo.
Roberto: Dankon! Panjo, la supo tre bongustas al mi.
La patrino: Mi ĝojas, kara filĉjo.

ĉ/

La patrino: Ĉu vi deziras kafon aŭ teon?
Sinjoro S.: Estas egale. Sed eble... jes, mi petas teon!
La patrino: Bonvolu. Aha, ĉu vi deziras teon kun citrono aŭ sen citrono?
Sinjoro S.: Mi petas teon sen citrono.
La patro: Do, pasintsemajne vi estis en Hungario, ĉu ne?
Sinjoro S.: Jes, mi estis en Hungario. Kune kun mi estis kelkaj miaj geamikoj. Estis tre agrable.
La patro: En kiuj urboj vi estis?
Sinjoro S.: Unue ni estis en Budapeŝto. Ĝi estas tre bela kaj granda urbo. Loĝas tie tre ĉarmaj, tre karaj homoj. Due - ni estis apud Balatono en kelkaj malgrandaj urboj. Kaj trie - ni estis en Kecskemet kaj en Szeged.
Roberto: En Szeged?
Sinjoro S.: Jes, ni ankaŭ estis en Szeged. Ĝi estas tre bela urbo. Sed, kial vi tiel miras?
Roberto: Mi ne miras, sed mi korespondas kun unu hungaro, kiu ĝuste loĝas en Szeged. Ni korespondas en Esperanto.
Sinjoro S.: Mi gratulas al vi! Verŝajne vi deziras forveturi al Szeged, ĉu ne?
Roberto: Jes, mi deziras.
La patrino: La teo jam estas preta!

## Objaśnienia

invíti por tagmanĝo zaprosić na obiad
devus esti powinien być /devus powinien, powinna, powinno/
laŭ la vekhorloĝo według budzika /veki budzić/
malfermu la pordon! otwórz drzwi! /fermi zamykać, malfermi otwierać/
bongustas al mi /= estas bongusta al mi/ smakuje mi
filĉjo syneczku /filo syn/
unue po pierwsze /patrz gram. "liczebniki przysłówkowe"/

## 4. LETERO

Kara Tibor!

Mi kore dankas al vi pro via letero. Vi demandis min en via letero, en kioma klaso mi lernas? Mi deziras do informi vin, ke mi lernas en la unua klaso de teknikumo.

Laŭ via peto mi sendis al via fratino bildkartojn pri Varsovio, Krakovo, Vroclavo, Gdansko kaj Poznanio. Al vi mi sendis kelkajn turismajn prospektojn pri Varsovio kaj Żelazowa Wola, kie naskiĝis la granda pola komponisto Frederiko Chopin.

Antaŭ kelkaj tagoj mi interparolis kun amiko de miaj gepatroj, kiu pasintmonate estis en Hungario. Li multe rakontis pri Budapeŝto, Balatono kaj ankaŭ pri Szeged. Ĉu vi povas sendi al mi kelkajn bildkartojn pri via urbo? La amiko de miaj gepatroj rakontis ankaŭ pri muzeoj, arkitekturo kaj pri la vivo en via lando. Li ankaŭ rakontis pri la hungaraj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj. Ĉu vi povas skribi al mi pri viaj manĝaĵoj? Mia patrino tre interesiĝas pri la hungaraj manĝaĵoj kaj ŝi volus kuiri la hungaran fiŝsupon.

Kore salutas vin

Roberto

## Objaśnienia

mi dankas pro... dziękuję za...
laŭ via peto na twoją prośbę /dosł. według twojej prośby/
kie naskiĝis gdzie urodził się /naskiĝi urodzić się/
fiŝsupo zupa rybna /fiŝo ryba/

## Słowniczek

afabla uprzejmy; arkitekturo /= arĥitekturo/ architektura; bongusta smaczny; bovo wół; buljono buljon, rosół; certe z pewnością, na pewno; cindro popiół; citrono cytryna; deserto deser; devus powinien, powinna, powinno; farunbulo klusek; fermi zamknąć; fiŝo ryba; forko widelec; frukto owoc; fungo grzyb; hungara węgierski; hungaro Węgier; koko kogut; kontroli kontrolować; konstati stwierdzić; kotleto kotlet; kuiri gotować; kukumo ogórek; kulero łyżka; lando kraj; legomo jarzyna; makaronio makaron; meti kłaść, położyć; mezo środek; miri dziwić się; mustardo musztarda; ovo jajko; papriko papryka; pipro pieprz; pledo półmisek; tu: danie; porko świnia; preta gotowy; rizo ryż; salo sól; subtaso spodek; sukero cukier; supo zupa; taso filiżanka; telero talerz; terpomo ziemniak; tomato pomidor; tranĉilo nóż; vekhorloĝo budzik; verŝajne prawdopodobnie.

## GRAMATIKA

### Przyrostek -AĴ

Przyrostek -aĵ oznacza produkt czynności, produkt o cechach wskazanych przez pierwiastek słowny, produkt z czegoś zrobiony /zwłaszcza w odniesieniu do potraw/, np.:

bovo - wół — bovaĵo - wołowina
porko - świnia — porkaĵo - wieprzowina
koko - kogut — kokaĵo - mięso z koguta

| | |
|---|---|
| ovo - jajko | ovaĵo - jajecznica |
| konstrui - budować | konstruaĵo - budynek, budowla |

Uwaga! Przyrostek -aĵ występuje również jako samodzielne słowo:
aĵo - rzecz, przedmiot

## Przyrostek - UJ

Przyrostek -uj ma trzy znaczenia, m.in. służy on do tworzenia nazw pojemników do przechowywania czegoś, np.:

| | |
|---|---|
| salo - sól | salujo - solniczka |
| sukero - cukier | sukerujo - cukierniczka |
| cindro - popiół | cindrujo - popielniczka |
| inko - atrament | inkujo - kałamarz |
| mono - pieniądz, pieniądze | monujo - portfel |
| monero - bilon, moneta | monerujo - portmonetka |

Uwaga! Przyrostek -uj występuje jako samodzielny wyraz:
ujo - pojemnik /do przechowywania czegoś/

## Liczebniki przysłówkowe

Liczebniki przysłówkowe tworzy się przez dodanie końcówki przysłówkowej -e do liczebnika głównego:

unu + e = unue - po pierwsze
du + e = due - po drugie
tri + e = trie - po trzecie
kvar + e = kvare - po czwarte
kvin + e = kvine - po piąte, itp.

## Ć W I C Z E N I A

I. Uzupełnić według wzoru:

trinki pić, trinkaĵo ______, manĝi jeść, manĝaĵo ______, konstrui budować, konstruaĵo ______, ovo jajko, ovaĵo ______, kokino kura, kokinaĵo ______

II. Odpowiedzieć na pytania:

1. Kion vi tagmanĝis hieraŭ?
2. Kion vi manĝis por la unua plado, kion vi manĝis por la dua plado kaj kion vi manĝis por deserto?
3. Ĉu vi ŝatas buljonon?
4. Ĉu vi ŝatas tomatan supon?
5. Ĉu vi ŝatas kukoman supon?
6. Ĉu vi ŝatas bovaĵon kun farunbuloj?
7. Ĉu vi ŝatas porkaĵon kun terpomoj kaj legomoj?
8. Ĉu vi ŝatas ovaĵon kun ŝinko?
9. Ĉu vi ŝatas fiŝsupon?
10. Ĉu vi tagmanĝas hejme aŭ en via laborejo /lernejo/?

III. Podkreślić w lekcji 15 słowa z przyrostkiem wskazującym nazwę pojemnika, naczynia.

PZE, nakład 5000, Wydanie VII, cena 30 zł-4330-197

Wyk. Urząd M. St. W-wy zam. 4440/80 n.5000 0-423